

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 641 (4)

Aprilo 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso: S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Girkonto: 378964

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1959): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Cefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld 1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto: Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO PREZENTAS

Krakow — La Maria-preĝejo

Enhavo

La Universala Kongreso	61
Almenaŭ normala pago por supernormale valora afero	61
Esperantismaj Problemoj	62
En Trezorejo	63
La lingva problemo en la sciencaj rondoj en Japanujo	65
Universitataj Katedroj de Esperanto	68
Zmenhof-Bibliografio	68
Helsingør	68
Bonvenon en Varsovio	70
Aperontaj Libroj	76
Instruistaj kunvenoj dum la UK, Varsovio	77

Rubrikoj:

Okaze de la Zamenhof-Jaro	65
CED	67
Internaciaj Konkursoj	68
Nia Forumo	69
Belartaj Konkursoj	72
Novaj Libroj	73
Ŝaka Rubriko	75
Radio	76
44-a Universala Kongreso	77
Tra la Mondo	78
Oficiala Informilo	78

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendadas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

La Universala Kongreso en la urbo de Zamenhof

Mi ne riskas troigon konstatante, ke niaj Universalaj Kongresoj de jaro al jaro pliperfektigas en senco organiza, informa kaj kultura. La pli ol duonjarcenta sperto pri organizo de la Esperantaj kongresoj estigis certan tradicion, laŭ kiu plej taŭgaj kaj selektaj programeroj ripetigas ĉiujare tiel en la kongresaj laborhoroj, kiel en ĝiaj distrohoroj. Tradiciaj jam fariĝis la Interkonatiga Vespero, la Inaŭguro, la ĝeneralaj kunvenoj, la Internacia Somera Universitato, la Belarta Konkurso, la teatraĵoj, la balo, la ekskursoj, la blindulkongreso kaj en la lastaj jaroj ankaŭ la Infana Kongreseto. Kelkiuj povas repliki, ke tiu kongresa tradicio havas ankaŭ sian ombran flankon, ĉar la kongresoj riskas ŝtoniĝi, fariĝi unutonaj, stereotipaj, ŝablonaj. Feliĉe tiel ne estas, ĉar la kongresoj kontinuas sian tradicion nur *laŭforme*, sed ne *laŭenhave*. Ĉiu kongreso plenigas la malnovan formon per nova enhavo, per la koloro de la loko, kie ĝi okazas. Tial, malgraŭ la preskaŭ identa kadra programo, ĉiu kongreso havas sian specialan etoson, distingantan ĝin de aliaj kongresoj, kaj tial la kongresanoj sentas ĝin kiel novan travivaĵon, kiel freŝan emocijon.

La nunjara varsovia kongreso observas la ĝisnunajn kongresajn tradiciojn kaj plenmane ĉerpas el la spertotrezoro de la kvardek tri antaŭaj kongresoj. La varsovia kongreso havas tamen ankaŭ sian specifan trajton, karakterizan novon, kiun atribuas al ĝi ne sole la loka kolororiĉo de Varsovio (urbo, kiu estis ĝisfundamente bruligita kaj renaskiĝis el siaj cindroj kiel la fabela Fenikso), sed ankaŭ kelkaj elementoj de tutmonde Esperanta kaj internacia karaktero:

Unue — la kongreso okazas en jubilea jaro, tiu de la centjara naskiĝtago de Zamenhof. La kulmino de la jubileaj solenaĵoj okazos en Varsovio. Tuta tago de la kongreso estos dediĉita al la kreinto de Esperanto. La Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-Jaro, en kiun eniris la kultura, scienca kaj politika elito de la nuntempo, kronas la jubileajn solenaĵojn per ĝis nun nevidata aŭreolo de seriozo, celkonscio *neŝancetebla* fido je nia finvenko kaj havigas al la Zamenhof-solenaĵo karakteron ne sole Esperantan, sed internacian.

Due — la kongreso okazas en la lando, kie naskiĝis Zamenhof, kaj en la urbo, kie li vivis, kie li publikigis sian senmortan verkon, kaj kie troviĝas ankaŭ lia tombo.

Trie — la Kongreso okazas la unuan fojon post la milito en unu el la popoldemokratiaj landoj, en kiuj la esperantistoj estis dum longa tempo forŝiritaj de la ĝenerala Esperanto-movado. Ĝi okazas en favoraj kondiĉoj sub la protekto de la Ministro-Prezidanto de Pollando. Tiu cirkonstanco havas gravan signifon por la kongreso, ĉar la unuan fojon post la milito la kongreso povas esti vere universala, arigante grandnombre partoprenantojn el Oriento kaj Okcidento. Tio plie atestas pri la idea forto de Esperanto, kiu povas kolekti sub unu standardo homojn de diversaj politikaj kaj religiaj konvinkoj, forŝovante ĉiujn barojn kaj kurtenojn, eĉ "ferajn".

Eble la menciitaj cirkonstancoj kaŭzas la grandan interesiĝon pri la varsovia Kongreso. Atestas pri tio la rekorda aliĝado al la kongreso el 39 landoj kaj el ĉiuj kontinentoj.

La Kongreso en Varsovio havas do la ŝancon fariĝi amasa manifestacio de la kreskantaj fortoj de la Esperanto-movado. Pri tio skribas prof. Lapenna en sia letero al la Varsovia LKK: "Ni ĉiuj varme deziras, ke la kongreso en Varsovio estu la plej brila en la tuta historio de la Esperanto-movado... ek al plej intensa laboro por plena sukcesigo de la 44-a Universala Kongreso, la kulmina punkto de la jubilea Zamenhof-Jaro".

Andreo Rajski

Almenaŭ normala pago por supernormale valora afero

U.E.A. havas membron kun tre laŭdinda kutimo: li gvidas kursojn, akceptas por tio normalan pagon kaj, ne dezirante mem enspezi tiun monon, regule sendadas la ricevitaĵajn sumojn al U.E.A. por diversaj celoj: CED, Fondajo Zamenhof, APO, Ĝenerala Kaso ktp. Per tio li atingas unue, ke la kursanoj respektas Esperanton, ke ili taksas ĝin almenaŭ egalvalora al aliaj lingvoj aŭ kursobjektoj. Estas ja normale, ke oni pagas por io, kion oni lernas aŭ aĉetas. Due, la kursanoj sufiĉe regule venas al la kurso, ĉar ili ja volas ion havi de sia mono. Trie, li tre efike helpas la movadon kaj subtenas ĝiajn specialajn agadojn.

Aliflanke, ofte ni ricevas informojn pri senpagaj kursoj. La organizantoj de tiuj kursoj atingas unue, ke malfacile eblas vekti iom da respekto por Esperanto ĉe la kursanoj, ĉar kio estas senpaga, ĝenerale ne estas alte taksata. Due, la kursanoj, kiuj neniom oferis por la kurso, pli facile forrestas de la kurso post iom da tempo. Trie, la movado, eĉ la loka, restas sen mono, ofte eĉ perdas pro la organizado de la kurso.

Ni deziras akcenti, ke senpaga kurso, malgraŭ la plej bonaj intencoj kaj sinoferoj, estas takta eraro kaj maljustaĵo al Esperanto. Estas psikologia fenomeno, ke io senpaga aŭtomate provokas impreson pri io malpli valora. Por ĉio ajn oni ja devas normale pagi. Esperanto-kurso, kontraŭe, estas ne malpli sed supernormale valora. Oni nur, objektivite, komparu laŭ ĝiaj praktika kaj kultura rezultoj la valoron de unujara kurso de Esperanto kun tiu de trijara kurso de ekz. la franca lingvo en iu nefranclingva lando. Tial estas maljuste ne pagigi por ĝi.

Ĉar ni deziras atingi grandan publikon, la kotizo estu ne tro alta, sed ĉiu kursano, malriĉa aŭ ne, pagu almenaŭ iom. Multaj malnovaj esperantistoj ĝojis dum la tuta vivo, ĉar iam ili oferis iujn ajn aliajn plezuretojn por povi "aĉeti" la eblecon konatiĝi kun la monda kulturo.

Laŭdinda estas la kursgvidantoj, kiuj pro idealismo ne deziras enspezi per Esperanto. Sed ankaŭ idealismo estu praktika. Se ĉiuj, kiuj nun instruas senpage, ekde la novaj kursoj en la Zamenhof-Jaro pagigos per iu reala kurskotizo kaj disponigos la tiel kolektitajn sumojn al la movado laŭ la ekzemplo de la supremenciita praktika idealisto, estiĝos eblecoj por entreprenendaj agadoj nun ne entreprenitaj pro manko de monrimedoj. Ja estas plorinda la penso, ke por gravaj kulturaj taskoj mankas mono, dum aliflanke oni kvazaŭ "disdonas" Esperanton senpage....

Dir. C.O.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

Financoj

Du problemoj daŭre okupis la Esperantistaron — cetere ankaŭ aliaj movadoj internaciaj ilin konas — nome, la organiz-formo kaj la financoj. Dum jardekoj ni batalis, diskutis, disputis, iafoje eĉ akre atakis nin reciproke. Nur el diskutado kaj provado rezultos fine io pli daŭra. Hodiaŭ la organiza formo ne plu ludas rolon. Aliaj problemoj levigas, sed unu restas konstante. Tio estas la nervo de ĉia agado homa, la mono, la financoj.

El la pli ol kvindekjara eksperimentado pri la problemoj "kiel trovi la monon necesan" rezultis diversaj konstatoj — veraĵoj ne fordisputeblaj —. La du ĉefaj estas:

1. Neniam nia movado povos kalkuli je granda amaso de pagantaj, precize, de bone pagantaj membroj;

2. ke la kotizoj ĝuste sufiĉas por pagi la plej elementan bezonajon — jarlibron, revuon kaj la administran aparaton — absolute necesan.

Du tendencoj troviĝas en ĉia movado: Malalta kotizo — granda nombro da anoj (komerca principo inverse: granda kvanto de produktaĵoj, sekve malalta prezo); la dua estas la selekta principo. Alta kotizo — ne granda nombro da membroj. Pro prestiĝo la unua maniero estas plej ofte sekvata. UEA bazas sur miksita sistemo: Asociaj membroj (granda nombro de malmulte kontribuantaj membroj) plus kompletaj membroj ricevantaj Jarlibron, revuon k.a.

La longjara sperto montras, ke por apartaj klopodadoj (Ligo de Nacioj, grandaj konferencoj teknikaj, peticio tutmonda, UNESKO-konferenco k.a.) mankas la necesa mono. Oni trovas ĝin per kolektado, ne tre digna procedado, sed kvazaŭ sankciita per tradicio kaj — aliaj entreprenoj devas fari same. Krom cititaj klopodadoj ne daŭraj, restas aliaj devoj, aŭ bezonaĵoj: propagando, eldono de

valoraj sciencaj-teknikaj verkoj, fakvortaroj, konstanta Enciklopedio k.t.p., plenumataj pli malpli amatore, denove pro monmanko.

Restas la demando pri bonfarantoj, kiuj per donaco de granda sumo ebligas ion, kion per la tradicia maniero oni ne povas plenumi. Tiaj mecenaj ekzistis (D-ro Javal, Generalo Sebert, H. Hodler, D-ro Buchanan, Gesinjoroj Dinslage k.a.) sed ĉi tiuj donacoj servis por manteni la tiutempan aparaton, oficejon, eldonaĵojn, pagi deficitojn de kongresoj. Unu el la nomitaj bonfarintoj destinis grandan kapitalon por universitata katedro.

La donaco por fiksita celo (fondaĵo) kiu laŭ la volo de la donacinto servu ekskluzive por tio, estas do la plej bona formo, helpi al la movado, samtempe ligi la donacon je la nomo de l'bonfaranto. Povas esti antaŭvidata ĉia rezervaĵo, garantio (cautela) por respekti la volon de l' donacinto. Fondaĵoj por tia fiksita celo estas sub ŝtata kontrolo en aro da landoj, plia garantio, ke oni ne deflankiĝu kaj malatentu la volon de l' bonfaranto.

Grava problemoj estas la formo de la donaco, ĉu per testamenta volesprimo, ĉu per donaco inter vivantoj. La laŭtestamenta donaco estas dependa de leĝaj kondiĉoj, variaj laŭ la landoj. Pri tio, la Estraro de UEA povas doni konsilojn. Por la dua Formo — "donatio inter vivos" — la eblecoj estas multnombraj. Pri ili la subskribanto havas multajn spertojn, akiritajn dank'al kontakto kun aliaj internaciaj organizaĵoj humanecaj en Genevo. Samideanoj kiuj iel deziras helpi je efektivo de io nepre necesa, al daŭrigo de io ekzistanta kaj penplene vivanta, estas volonte informataj kaj konsilataj, en laŭjure korekta maniero.

Hans Jakob



PARTO DE LKK LABORAS! De maldekstre: KKS s-ro Fighiera, la prez. de LKK s-ro Rajski kaj inĝ. Zamenhof.

LA REDAKCIO DE "ESPERANTO"

Laŭ la informoj sur la 2-a kovrilpaĝo la legantoj eble jam rimarkis, ke ekde tiu ĉi numero s-ino Kirsten Zacho sola redaktas la revuon. Kiam post la Universala Kongreso en Mainz s-ino Zacho kaj mi transprenis la redaktadon, estis interkonsento, ke mia redakta kunlaboro estu nur provizora, antaŭvideble dum proksimume duona jaro.

Je la fino de tiu periodo mi dankas al s-ino Zacho pro bonega kunlaboro kaj al la legantoj pro salutoj, simpatiesprimoj kaj kritikoj.

H. V. Rasmussen

EN TREZOREJO

La Biblioteko de Brita Esperantista Asocio

Kia devus esti grava faka Biblioteko pri Esperanto? Laŭ la preskaŭ senfinaj kulturaj ebloj de nia lingvo, kaj laŭ la graveco de bibliotekaj servoj al lingvaj okupoj, ĝi devus troviĝi en granda, impona, tute faka ejo, kun taŭga tabulo ĉe la pordo, kun bonegaj modernaj lampoj; ĝi devus havi pagitan, kvalifikitan stabon kaj ĉiujn normalajn fakbibliotekajn meblojn, inkluzive la necesajn aparatojn por multobligado, fotokopiado kaj mikrofilmigo. Ĝi devus havi belajn vitrinojn por montrindaj trezoroj, presitan katalogon, indekslistaron pri aŭtoroj, tradukantoj, librotitoloj kaj temoj.

Revo! Pluraj organizoj, kies sola celo estas disendi malamon, havas pli da monrimedoj por unu jaro de fia klopodado ol la Esperanta Movado por dek jaroj de utila, homaranisma laboro.

Mi ĵus faris kelkajn longajn vizitojn al la Biblioteko de la Brita Esperantista Asocio, 36 Penrhyn Road, Kingston-on-Thames, Surrey, Anglujo. Mia celo estis, kolekti informojn pri la vivo de Zamenhof, kies biografion anglalingvan mi nun verkas. Tiu ĉi Biblioteko tute ne havas adekvatan stabon, taŭgajn monrimedojn aŭ ĝisdatajn aparatojn. Ĝi tamen vekas optimismajn pensojn, ĉar ĝi estas jam tre impona trezorejo, kaj mirinda monumento al la sindediĉo kaj kompetento de unu homo. Tia trezorejo, tiel plenigita, devus havi brilegan estontecon.

La malgranda, malnova domo kie troviĝas ĉi tiu trezorejo situas iom ekster Londono; oni vojaĝas el Waterloo-stacidomo dum eble dudek minutoj. Ekstere la domo ne estas impona; ĝi eĉ ne havas eksteran signon pri la Biblioteko. Sed la enhavo estas alia afero.

Venkante, per sindediĉo, mankon de spaco, de mono, de tempo, s-ro M. C. Butler, la Bibliotekisto, organizis Bibliotekon, kies valoro por seriozaj erudiciaj esploroj pri Esperanto estas apenaŭ troi-



S-ro M. C. Butler ĉe la granda indekslistaro.

gebla. La Movado ŝuldas tion plejparte al tiu unu homo. Stabon li ne havas kaj neniam havis; ĉio devas esti prizorgita de tiu dediĉito, nun maljuna, neforta kaj premita per multaj aliaj taskoj.

La Biblioteko de B.E.A. naskiĝis en 1922 kiel donacita kolekto de 380 libroj. Nun verŝajne proksimume 5,000 libroj troviĝas tie. Oni ne povas tre precize kalkuli, ĉar kio estas libro? dudek binditaj volumoj de gazeto? dekpaĝa broŝureto? Ĉio estas klasifikita laŭteme — ne nur libroj, sed multaj gravaj artikoloj. Aŭtorindekso bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas, pro tempomanko.

Por fari tiun kolosan kaj neniam finitan klasifikan taskon kompetente, oni devis krei detalan apartan klasifikan sistemon pri Esperantaj temoj. La ne-Esperanta parto de la Biblioteko estas klasifikita laŭ la decimala sistemo de Dewey, plibonigita de la Internacia Instituto de Bibliografio kaj poste de la British Standards Institution. La Esperanta parto estas klasifikita laŭ la presita **Klasifo de Esperantaj Temoj**, verkita de M. C. Butler. (Eldonita en 1950; prezo 21 steloj.) Tiu libro ne ricevis la atenton, kiun ĝi meritas: ĝi estus utila ne nur al bibliotekistoj, sed al ĉiuj seriozaj Esperantistoj. En ĝi la inteligenta leganto trovas ne nur la sistemon de la B.E.A.-biblioteko, sed tre pensigajn listojn de ideoj pri, ekzemple, organizado, instruado, propagando, gramatikaj problemoj, tropoj, lingvoprojektoj kaj literaturaj formoj. Oni povus tre bone uzi la libron por kontroli sian veran scion pri Esperanto. La libro spegulas grandan penadon kaj konsterne detalan fakan scion.

La Biblioteko de B.E.A., baobabe kreskinte dum nur 36 jaroj, nun okupas murojn en tri ĉambroj de la domo. Libroj altaj ĝis 25 cm. okupas proks. 110 metrojn da bretospaco; libroj pli altaj, ĝis 30 cm., okupas proks. 9 metrojn; kaj la pli grandaj libroj, en grandaj ŝrankoj, okupas jam preskaŭ 3 metrojn. Krome la Biblioteko enhavas specialajn bretojn por liliputaj libroj, dudekdu grandajn ujojn por muziknotoj, grandaj fotoj kaj diversaj dokumentoj; ne malpli ol 170 dokumentujojn — speciale menditajn kaj tre praktikajn — kiuj enhavas manuskriptojn, broŝuretojn k.t.p., kaj ujojn kiuj enhavas pli ol 8,600 poŝtkartojn, glumarkojn, malgrandajn fotojn, subskribojn kaj similajn malgrandaĵojn interesajn al Esperantistoj.

Multo, kiun tiel gravega Esperantista biblioteko devus fari, restas simple nefarebla, pro manko de stabo, mono kaj spaco. Sed sinjoro Butler dum jaroj donis la plej valoran kaj malegoistan helpon al Esperantistaj redaktoroj, verkistoj, kaj aliaj seriozaj esplorantoj. Ekzemple, la nova **Esperanta**

Antologio, redaktita de William Auld, estos dum longa tempo valorega libro, ne nur por nia plezuro sed kiel municio en nia kultura batalo; kaj sinjoro Auld agnoskas la grandan helpon de la Biblioteko de B.E.A. Sen tia helpo, mia propra laboro pri la vivo de Zamenhof devus esti hontinde supraĵeca. Pluraj ne-Esperantistaj erudiciuloj ankaŭ uzis la Bibliotekon por studi temojn rilatajn al problemoj de internacia lingvistiko.

Sinjoro M. C. Butler faras multon, kiun oni kutime ne atendus de la bibliotekisto en serioza faka biblioteko. Kiam mi laboris tie, li multe zorgis pri mia persona komforto, kaj ne faris postulojn pri fermaj horoj! Li ne nur permesis al mi libere traserĉi la katalogon kaj serĉi aŭ peti librojn kaj dokumentojn; ĉiam kiam li mem subite havis ideon pri eble utila libro aŭ dokumento, kiun mi ne jam trovis, li aperis malantaŭ mi kiel bonvolema fantomo kaj faciligis miajn esplorojn. Kortaŭsa helpemo vere radias el li. Estas bedaŭrinde, ke multaj homoj, precipe ekster Anglujo, ne komprenas pri la manko de stabo kaj rimedoj, kaj ofte postulas de la maljuna Bibliotekisto servojn tute maleblajn, ekzemple longan kopiadon kaj komplikajn esplorojn. Oni ne plendu, se Biblioteko tia ne povas fari miraklojn; oni pli bone subtenu ĝin kaj ebligu al ĝi pli bonajn servojn!

Estus, laŭ mia opinio, tre bone, se la Movado povus iom pli helpi al tiel valorega kaj vivanta monumento, kiu ofte servas, ne nur al B.E.A. sed al la tutmonda Esperanta Movado. Eldonistoj povus helpi per ĉiama sendo de novaj verkoj, kaj ne sentus la bagatelan malprofiton. Redaktoroj povus fari same pri gazetoj, kaj privataj personoj pri Esperantistaj dokumentoj kaj trezoroj kiujn ili mem ne bezonas, sed kiuj estas historie tro gravaj por forĵeti. Monon por bindado de libroj kaj multaj aliaj celoj la Biblioteko ĉiam bezonas. Ni ĉiuj scias, ke la Movado ne havas sufiĉan monon por subteni niajn fakajn bibliotekojn kaj niajn aliajn multajn indajn laborojn; sed ni ankaŭ ĉiuj konas la rimedon: oferi el niaj propraj poŝoj, kaj, eĉ pli grave, konstante varbi pli kaj pli da anoj de naciaj organizoj, de U.E.A., kaj pli da Apogantoj de U.E.A.



Kelkaj trezoroj en la biblioteko de B.E.A.



Angulo en la Biblioteko de B.E.A.

En tiu Biblioteko troviĝas multaj trezoroj, kiujn oni apenaŭ povas rigardi sen larmoj. Jen atestaĵoj pri la fruaj luktoj: la unuaj anglaj, francaj, polaj lernolibroj, semetoj el kiuj poste kreskis majestaj cedroj; la unua numero de **La Esperantisto** estas tie trafoliumebla — la sola alia plena kolekto de tiu gazeto en la mondo troviĝas en la Brita Muzeo; la unuaj eldonoj de multaj Zamenhof-verkoj; dokumentoj pri la fruaj kongresoj.

Jen dokumentoj pri la perfido de la Idistoj. En la idaj gazetartikoloj ni povas legi kalumniojn kontraŭ Zamenhof, kruelajn senbazajn kalumniojn pri diktatoreco kaj aroganteco, kiuj suferigas la animon eĉ hodiaŭ; jen dokumentoj inspiroplenaj, kiuj montras la nevenkeblan fidon de la Esperantistoj dum du mondmilitoj; jen amaso da poŝtkartoj kaj kelkaj leteroj skribitaj de D-ro Zamenhof mem; jen fotoĵoj kiuj revivigas la pasintecon aŭ historiigas la nunon. En tiu ĉi Biblioteko ni povas vidi plurajn bonegajn portretojn de D-ro Zamenhof, kaj serĉi en tiuj mildaj, miopaj okuloj la sekreton de lia sindonemo, lia senlima karitato. Fruaj kongresbildoj, dokumentoj pri forgesitaj martiroj, forgesitaj sindonoj, forgesitaj bonfaroj de Esperanto, troviĝas tie. Ankaŭ la cerbo de sinjoro Butler estas tre interesa arkivo; sed bedaŭrinde ĝi ne povos esti fotokopiita!

Tie oni ankaŭ povas esplori la literaturon de nia lingvo, kiu, laŭ multaj ne-Esperantistoj, ne taŭgas por literaturo. Strange do ke la literaturo okupas tiom da bretoj. Oni povas esplori multajn verkojn de kleraj, eminentaj homoj, por kiuj Esperanto ne estis lingvo por frenezuloj; oni povas kontroli, kiom da serioza lingva studado kontribuis al la nuna nuancita matureco de la lingvo.

En tiu Biblioteko de B.E.A., unufraze, iu ajn serioza Esperantisto povas tre instruiĝi, kaj tre fieri, vidante la amplekson de nia juna kulturo, la esencan dignon de nia ideologio kaj organizado. Sed tiu serioza Esperantisto, pensante pri la laborjaroj kiuj konstruis tian monumenton, samtempe devas sufiĉe humili, kaj fari denove al si la gravan, al ni ĉiuj devigan demandon: "Ĉu mi vere faris mian plenan eblon por Esperanto?"

Marjorie Boulton

Kial mi fariĝis Esperantisto ? La lingva problemo en la sciencaj rondoj de Japanujo

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de
D-ro Zamenhof verkita de
Prof. D-ro Seiho Nishi, Maebasi, Japanujo

Mi naskiĝis en Tokio en 1885, 2 jarojn antaŭ la naskiĝo de la Internacia Lingvo, pasigis mian lernejan vivon en Tokio kaj finis la medicinan kurson en la Ŝtata Tokio-Universitato en 1908. De 1912 ĝis 1915 mi restadis unue en Heidelberg, poste en Zürich, por speciale studi la anatomion. Reveninte al la hejmlando mi estis enoficigita en la Ŝtata Tohoku-Universitato en Sendai kiel profesoro de anatomio. En 1922 mi estis invitita al mia *Alma Mater*, kie mi plenumis mian oficon ĝis 1945.

Komprenoble la scienco faris en moderna Japanujo de post la revolucio en 1868 mirindan progreson sub la gvido de eŭropaj kaj usonaj sciencistoj, kaj tiuj, kiuj tiam volis sinoferi al la scienco, devis sekve antaŭ ĉio sufiĉe majstri almenaŭ unu fremdan kulturlingvon. Jam en mezlernejoj konsiderinde multaj horoj estis de tiam devige dediĉataj al la lernado de la angla lingvo, kaj en gimnazioj, krome, al tiu de la germana aŭ la franca. La cirkonstancoj ne estas aliaj eĉ nun post la milito. Ĉar la medicinaj sciencoj estis tiam instruataj kaj studataj ekskluzive laŭ la germana modelo, tiuj kiuj volis fariĝi kuracistoj aŭ medicinistoj devis kiel kondiĉo nepre ellerni la germanan lingvon. En medicinaj kolegioj la studentoj uzis tiam nur germanajn lernolibrojn, la lekcioj estis kutime farataj per stranga lingvosalato el japanaj kaj germanaj vortoj. Medicinistoj volonte parolis germanajn fakvortojn kaj publikigis siajn traktatojn ofte per la germana lingvo; ili devis ankaŭ pasigi kelkajn jarojn en Eŭropo, precipe en Germanujo, se ili volis distingiĝi en sia fako, precipe se ili celis fariĝi universitataj profesoroj. Ankaŭ mi tiamaniere estis sendita de la registaro por kelkaj jaroj al Germanujo, kie mi restadis ĝis la eksplodo de la unua mondmilito en 1914, nenion konsiderante pri la fremdlingva problemo.

Kiam tamen la milito finiĝis per la kompleta malvenko de Germanujo, granda konfuzo okazis ankaŭ en nia medicina rondo. Multaj medicinistoj bojkotis la "malamikan" lingvon, kaj komencis nove eklerni la anglan. En tiaj cirkonstancoj mi la unuan fojon komencis serioze pripensi pri la lingva problemo en la scienco kaj post longa meditado mi fine venis al konkludo, ke la scienca lingvo estu nur neŭtrala kaj sennacieca, sendependa de iuj ajn internaciaj konfliktoj. Mi povis ankaŭ bone kompreni, kial oni en la mezepoko utiligis la

latinan lingvon kiel la sciencan spite de diversaj maloportunecoj. Nur Esperanto estu de nun la sola internacia scienca lingvo, mi diris al mi mem, kaj kun firma konvinko mi komencis memlerni ĝin per malgranda lernolibro, tute sola, ne ektrovante eĉ unu samopiniulon, kaj plue nenion sciante pri la Esperanto-movado en tiama Japanujo.

La unua esperantisto en Japanujo estis verŝajne Asajiŝiro Oka, fama zoologo, kiu jam en 1891 memlernis la lingvon en Freiburg i. Br. (Germanujo). Li mem estis ellaborinta projekton de internacia lingvo, kiun li nomis Zilengo (nia lingvo), sed eksciinte pri la supereco de Esperanto li senhezite forĵetis ĝin kaj restis vivlonge fidela esperantisto. Liaj du filoj estas hodiaŭ eminentaj biologoj kaj samtempe lertaj esperantistoj. Kiel pionirojn de Esperanto en la japanaj sciencaj rondoj mi volas ĉi tie menciigi tri eminentulojn inter multaj aliaj: Husakiĉi Oomori, geofizikisto, Kijo'o Nakamura kaj Ŭasaburo Ooiŝi, ambaŭ meteorologoj. Ili jam en la komenco de nia jarcento publikigis fakajn traktatojn en Esperanto. Mi ankaŭ ne povas preterlasi la nomojn de tri pliaj agantoj en la unuaj tagoj de la Esperanto-Movado, al kiuj ni estas por ĉiam dankemaj. George Edward Gauntlett el Kimrujo, kiu kiel instruisto de la angla lingvo en la ŝtata gimnazio en Okajama provis jam en 1905 instruadon de Esperanto per korespondado; Kacumi Kuroita, kiu tiam kiel juna profesoro de la japana historio en la Ŝtata Tokio-Universitato energie klopodis por la organizo de la Japana Esperanto Asocio fondita en 1906; Kenji Ossaka, fervoja inĝeniero, kiu kiel unu el la plej malnovaj kaj meritoplenaj esperantistoj jubileis la pasintan jaron sian 70-an naskiĝtagon.

Reveninte al mia hejmurbo en 1922 mi por la unua fojo havis ŝancon kontaktiĝi kun la Esperanto-movado en Japanujo, en kies centro staras la Japana Esperanto Instituto ekde sia fondiĝo en 1919. En 1923 ni organizis malgrandan societeton nomatan unue Hipokratida Klubo, poste Eskulapida Klubo, konsistanta el kelke da medicinaj studentoj kaj profesoroj en nia kolegio, pli poste la Japanan Esperantistan Medicinistan Asocion en pli vasta amplekso, kaj komencis agi por la Internacia Lingvo en la sciencaj medioj. En la 6-a Orienta Kongreso por Tropika Medicino okazigita en 1925 en Tokio ni sukcesis enkonduki Esperanton kiel oficiale aprobitan lingvon krom la angla kaj la franca. Mia unua traktato skribita en Esperanto:

Pri la ĝenerala diferenciĝo de la trunkmuskolaro ĉe amfibioj, reptilioj kaj mamuloj estis publikigita la saman jaron en la Vol. 3 de **Folia Anatomica Japonica**, kies redaktoro Keiĵi Okajima, mia samfakano, iniciate akceptis mian Esperantan artikolon.

Kune kun la restariĝo de la germana medicino post la milito la germana lingvo pli kaj pli regajnis sian iaman influon en la medicinaj sciencaj medioj de Japanujo kaj preskaŭ anstataŭis la anglan. Tio daŭris ĝis la fino de la dua mondomilito (1945), en kiu la Berlin-Tokio Akso estis ĝisfunde detruita. Post la milito la tuta Japanujo estis abrupte kaj rapide "usonigata". Tokio aspektas nun kvazaŭ kolonia urbo de Usono. Nia medicino ankaŭ ne faras escepton. Medicinistoj prefere vizitadas nun Usonon anstataŭ Germanujon; parto de ili publikigas fremdlingvajn traktatojn plejparte en la angla lingvo, kvankam ili eĉ nun volonte uzas germanajn (ne japanajn, nek anglajn!) fakvortojn en siaj interparoladoj kaj prelegoj! Kiom longe daŭros tia oportunistama aŭ "potenculadora" sintenado, mi

ne scias. Mi tamen des pli firme kredas, ke ne nur ni japanaj sciencistoj, kies nacilingvo ne estas "internacia", sed ankaŭ ĉiuj sciencistoj, tute egale ĉu iliaj lingvoj estas "grandaj" aŭ ne, devu nepre posedi interkomunikilon sennaciecan, publikigilon tute liberan de ĉiuj internaciaj cirkonstancoj. La respondo estas memkomprenebla.

La ŝtala kurteno de lingvoj staras eĉ nun antaŭ ni sciencistoj, kio kompreneble ege malhelpas la progreson de sciencoj, kaj kion oni fakte spertis ĉe la Internacia Kongreso por Heredaj Sciencoj, okazigita en 1957 en nia lando. Tie la angla lingvo estis la sola oficiale aprobita kaj tre multaj japanaj partoprenintoj devis kunsidi tute aŭ preskaŭ tute surde kaj mute. Tiam maljustecon ni devas forigi per ĉiuj fortoj. Aliflanke ni ja staras sur la sojlo de Nova Epoko, kiel D-ro Ivo Lapenna iam prave diris. Per niaj senlacaj klopodoj kaj nur per ili ni povos transpaŝi la sojlon, disŝirante la lingvan kurtenon.

NACILINGVA GAZETARO PRI LA ZAMENHOF-JARO

En la oficejon de CED kaj en la Centran Oficejon de UEA komencis alvenadi eltranĉaĵoj de gazetoj kun informoj pri la Zamenhof-Jaro kaj kun artikoloj pri D-ro L. L. Zamenhof, laŭ la bultenoj de la Internacia Gazetara Servo de UEA, artikoloj senditaj de CED kaj materialoj liveritaj de la IOK. La artikolo de Prof. E. Privat aperis komplete en la granda itala gazeto *Il Piccolo* de la 14-a de februaro kun titolo super tri kolumnoj "Tolstoj Rekomendis al Ĉiuj Studi la Novan Lingvon". Temas pri la artikolo de Prof. Privat, aperinta en la januara numero de "Esperanto". Traduko bonega.

S-ro Fred Parker, komitatano de UEA, publikigis en la loka gazeto *Burnley Express* de la 11-a de februaro 1959 artikolon sub la titolo "Zamenhof-Jaro".

En la itala revuo *Il Colezionista*, februaro 1959, estas publikigita artikolo de advokato Ademaro Barbiellini Amidei kun titolo super la tuta paĝo "La Centjara Datreveno de la Naskiĝo de Zamenhof: Esperanto kaj Filatelio".

En la gazeto *Le Stanleyvillois* (Belga Kongo) de la 16-a de februaro estas publikigita longa artikolo pri la Zamenhof-Jaro kun titolo super tri kolumnoj.

Aliaj artikoloj aŭ informoj aperis en Soveta Unio, Germanujo, Jugoslavio, Pollando.

Estas bedaŭrinde konstati, ke kelkaj Esperanto-gazetoj, precipe kelkaj organoj de landaj asocioj, eĉ ne per unu vorto menciis la Zamenhof-Jaron. Ĉu efektive la nacilingva gazetaro havas pli da respekto por la aŭtoro de la Internacia Lingvo, ol kelkaj Esperantlingvaj gazetoj kaj revuoj?

Aranĝo en la Domo de Sciencistoj en Leningrad

La Sekcio de la Internacia Lingvo Esperanto de la Domo de Sciencistoj de la Akademio de Sciencoj de U.S.S.R. okazigis la 18-an de februaro 1959 en la ejoj de la Domo de Sciencistoj specialan aranĝon dediĉitan al la "Centjara Datreveno de la Naskiĝo de la Aŭtoro de la Lingvo Esperanto D-ro L. L. Zamenhof". Prelegis G. N. Teterin. Estis prezentita filmo.

Fondaĵo Zamenhof en Aŭstralio

Laŭ la gazeto *La Rondo*, organo de Aŭstralio Esperanto-Asocio, jam en la pasinta julio okazis kunveno de la aŭstraliaj esperantistoj por inaŭguri la grandan kampanjon por la Zamenhofa jubileo. Ĉefparolinto estis s-ro Ralf Harry, membro de la IOK. Estas kolektita tuj la sumo de £ 362-10-0. La celo de la Fondaĵo estas krei "Zamenhof-Domon", kiu fariĝos centro de la Esperanto-Movado en Aŭstralio.

Baza Dokumento en la Angla Lingvo

Dank' al iniciato de s-ro Leif Heilberg, tre agema kunlaboranto de la IF de UEA, nun en Montreal, Kanado, ĵus aperis en multobligita formo la Deklaracio, la listo de la Patrona Komitato kaj la artikolo pri Zamenhof de Prof. Privat en la angla lingvo. Al tiu Baza Dokumento estas aldonitaj kelkaj informoj de la IGS de UEA. La tuta materialo estas prezentita tre plaĉe. Ĝi estas sendita al 600 adresoj en Kanado. En la fino de la dokumento troviĝas informoj pri lernolibroj, vortaroj, kursoj, literaturo. Estas donitaj tri adresoj ĉe kiuj la interesiĝantoj povas peti pliajn informojn. Imitinda ekzemplo por la landaj asocioj kaj por niaj kunlaborantoj en regionoj sen organizita movado!

Ankoraŭ unu imitinda ekzemplo

Laŭ *Heroldo de Esperanto*, la loka ĵurnalo *De Posthoorn*, kiu estas eldonata en 200.000 ekzempleroj en Hago, decidis publikigi kurson de Esperanto, ĉar montrigis eksterordinare granda interesiĝo por ĝi. Pli ol 800 personoj esprimis la deziron lerni la lingvo en tia per-gazeta kurso kaj daŭre venas pliaj demandpetoj. Gratulon al la esperantistoj en Hago, kiuj iniciatis la kurson, kaj al la redakcio de la gazeto, kiu favore rilatas al deziroj de siaj legantoj. La esperantistoj ĉie tra la mondo imitu tiun ekzemplon. Kontakti la redakcion de via plej grava loka gazeto! Utiligu la Zamenhof-Jaron por disvastigi la lingvon ankaŭ tiamaniere.

EKSPOZICIO DE GAZETELTRANĈAĴOJ EN VARSOVIO

Okaze de la U.K. en Varsovio estos aranĝita, interalie ekspozicio de gazetelstranĉaĵoj kun artikoloj, informoj, fotoj aŭ kiu ajn alia presita materialo en ligo kun la Zamenhof-Jaro. Ĉiuj landaj asocioj, landaj informaj fakoj kaj aliaj kunlaborantoj en regionoj sen organizita movado, estas petataj sendi al la adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, aŭ al CED, aŭ al la Centra Oficejo de UEA eltranĉaĵojn, kiuj enhavas tian materialon. Vi estas petataj ne sendi la tutan gazeton, sed nur la koncernen artikolon, informon aŭ alian materialon kun jenaj indikoj, skribitaj per presliteroj: 1. Nomo de la gazeto aŭ revuo, dato, numero, loko de apero kaj lando; 2. Esperantlingva traduko de la titolo; 3. Indiko de la lingvo (ekzemple: hispana, portugala, slovena).

Tiu tuta materialo estos fotita kaj utiligita poste ankaŭ por la memorlibro, se, kiel planite, ĝi aperos fine de 1959 aŭ komence de 1960. La materialo poste estos konservita en la arkivo de CED.

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

Alvoko de CED al Geinstruistoj-Esperantistoj NOVAJ ENKETOJ PRI ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

Fine de 1955 CED entreprenis, pere de sia kunlaboranto por lernejoj aferoj s-ro D. Kennedy, enketon pri geinstruistoj-esperantistoj kaj pri lernejoj, en kiuj Esperanto estis tiam instruata. La rezultoj estis publikigitaj en la maja numero de "Esperanto", 1956, en la rubriko de CED sur la pp. 75-77.

Intertempe okazis multaj ŝanĝoj. Konsiderinda nombro da geinstruistoj ellernis la lingvon kaj kapabligis instrui ĝin en la lernejoj. Aliflanke, precipe en kelkaj landoj, la Internacia Lingvo estis enkondukita kiel deviga aŭ nedeviga objekto en pliajn lernejojn.

Nun, en la Zamenhof-Jaro, estas necese havigi ĝisdatajn informojn pri tiuj demandoj, des pli ke el diversaj flankoj ĉiam pli kaj pli alvenas informetoj. Se la Zamenhof-Jaro plene sukcesos, kiel planite, jam en 1960 la ĉefa agado direktiĝos al vasta enkonduko de la lingvo en la lernejojn. Ankaŭ por tiu celo estas bezonataj precizaj informoj, unuflanke, pri la nuntempa stato de Esperanto en la lernejoj kaj, aliflanke, pri la nombro de geinstruistoj kapablaj, se necese, instrui la lingvon en la lernejoj.

La Centro de Esploro kaj Dokumentado entreprenas, do, du enketojn: (a) pri la nombro de geinstruistoj-esperantistoj kaj (b) pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata.

A. Geinstruistoj-Esperantistoj

CED petas ĉiujn aktivajn aŭ emeritajn geinstruistojn kaj geprofesorojn, kiuj parolas Esperanton kaj kiuj instruas(is) kiun ajn objekton en kiu ajn lernejo aŭ universitato respondi, plej oportune per ordinara poŝtkarto, al jenaj demandoj:

(1) Lando; (2) urbo; (3) nomo; (4) adreso; (5) ĉu aktiva aŭ emerita; (6) nomo de la lernejo (nacilingve kaj esperante) en kiu vi instruas aŭ, se emerita, laste instruis; (7) grado de la lernejo sub (6) laŭ la leĝoj de via lando: ĉu elementa, mezgrada (liceo, gimnazio k.t.p.) aŭ altgrada (universitato aŭ samranga altlernejo); (8) objekto(j), kiu(jn) vi instruas(is); (9) ĉu vi estus preta, en okazo de bezono, instrui Esperanton en via lernejo aŭ en alia lernejo de via urbo aŭ loko? (10) dato kaj subskribo.

B. Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata

La dua enketo rilatas al la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata nuntempe. CED petas

ĉiujn geinstruistojn kaj geprofesorojn, kiuj instruas Esperanton en kiu ajn lernejo aŭ universitato, respondi al jenaj demandoj:

(1) Lando; (2) urbo; (3) nomo de la lernejo (nacilingve kaj esperante); (4) tipo de la lernejo: a/ elementa (aĝo ĝis. proks. 12 jaroj), b/ mezgrada (aĝo proks. 12 ĝis 18 jaroj), c/ universitato, kolegio aŭ simila altlernejo (aĝo proks. 18 ĝis 24 jaroj); (5) ĉu por knaboj-studentoj, knabinoj-studentinoj aŭ miksitaj; (6) nombro de gelerntoj laŭ la seksoj; (7) ĉu Esperanto estas instruata oficiale aŭ neoficiale, devige aŭ nedevige, en la kadro de la lerneja programo aŭ ekster ĝi; (8) kiom da jaroj oni jam instruas Esperanton; (9) nomo kaj adreso de la instruist(in)o aŭ profesor(in)o; (10) dato kaj subskribo.

La respondoj al la supraj demandoj *nepre* estu skribitaj sur aparta folieto de papero aŭ sur aparta poŝtkarto.

En ambaŭ enketoj la respondoj precize sekvu la vicordon de la demandoj. *Ĉiujn respondojn al ambaŭ enketoj bonvolu sendi al la kunlaboranto de CED por lernejoj demandoj s-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.*

CED tre esperas, ke ĉiuj geinstruistoj kaj geprofesoroj respondos kiel eble plej baldaŭ, sed *plej malfrue ĝis la fino de junio al la enketo sub A. kaj plej malfrue ĝis la fino de julio al la enketo sub B.* Ambaŭ enketoj estas eksterordinare gravaj por la estonta agado sur tiu ĉi kampo.

La Esperanta gazetaro estas petata represi la alvokon.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
Honorofica Direktoro de CED

Pliaj artikoloj okaze de la Zamenhof-Jaro

En la marta numero estas publikigita listo de artikoloj, verkitaĵoj de diversaj kunlaborantoj de CED okaze de la Zamenhof-Jaro. Post tio CED ricevis jenajn pliajn artikolojn:

Prof. D-ro Seiho Nishi, "Kial mi Fariĝis Esperantisto", publikigita en tiu ĉi numero de "Esperanto";

Preston Davis, J.r., "Esperanto kaj la Teorio de Komunikado";

Prof. D-ro Francisco Azorín-Poch, "Esperanto kaj Statistiko";

Prof. Clelia Conterno-Guglielminetti, "La Plej Juna Literaturo en la Mondo";

Ĉiuj ĉi artikoloj estos aŭ publikigitaj en la revuo "Esperanto" dum la Zamenhof-Jaro aŭ multobligitaj kaj senditaj por traduko kaj publikigo en la nacilingva gazetaro al la Informaj Fakoj de la landaj asocioj kaj al kunlaborantoj de la IF de UEA en landoj sen organizita movado. Sekve, se iu leganto deziras helpi per tradukoj aŭ havas eblecon publikigi iun el la artikoloj en iu gazeto aŭ revuo, aŭ utiligi ĝin por iu prelego, li bonvolu sin turni al sia landa asocio, landa Informa Fakoj aŭ kunlaboranto de UEA por tiu lando, sed *ne al CED*, kiu, pro la grandega laboro speciale en tiu ĉi jaro, ne povas korespondadi ankaŭ kun unuopuloj tra la mondo.

Donacoj por CED

	£	§	p
La stato de la 31-a de januaro 1959	3-14-	8	
S-ro G. R. Aitchison, Britujo	2-	0-	0
S-ro O. Finnbjarnarson, Islando	2-	0-	0
S-ro F. Kraus, Germanujo	1-	8	
S-ro M. Freitas, Portugalujo	18-	9	
S-ro B. Reich, Usono	1-15-	5	
N.N. en V. Nederlando	18-	9	
S-ino L. Berthold-Schmidt, Usono	17-13-	0	
S-ro G. P. Turner, Usono	10-	7	
La stato je la 28-a de febr. 1959	29-12-	10	

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C., Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris, 10, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Universitataj katedroj de Esperanto

En volumo I de *Esperantologio* mi publikigis dokumentan liston de universitataj katedroj de Esperanto. Preparante nun la unuan kajeron de volumo II de la revuo, mi klopodas ĝisdatigi la informojn pri tiaspecaj ekzistantaj katedroj (lektoratoj). Mi tial tre petas, ke oni sendu al mi informojn pri ŝanĝoj (ankaŭ pri eventualaj ĉesigoj!) de la malpli novaj katedroj kaj (se eble) detalajn informojn pri starigo de novaj katedroj, eĉ se tiaj jam estas menciitaj en la Esperanto-gazetaro. Ankaŭ nura atentigo pri tiaj novaj katedroj (se eble kun adreso por akiri plujajn informojn) estas tre bonvena.

La materialo kolektita pri tiu ĉi grava flanko de la instruado pri nia lingvo estos uzata — krom por *Esperantologio* — ankaŭ por tiuj esencaj dokumentoj kaj statistikoj pri nia movado, kiuj estas kompilataj sub gvidado de Centro de Esploro kaj Dokumentado, kaj kiuj poste estos publikigataj okaze de la Zamenhof-Jaro.

Mi tre petas pri kaj kore dankas pro *rapida helpo!*

D-ro Paul Neergaard,
Gothersgade 158, Kopenhago K,
Danlando.

Zamenhof bildbiografio

Multaj fotoj pri la vivo de Zamenhof perdiĝis dum la milito, kiam la Zamenhof-domo en Varsovio ruiniĝis. Tamen devas nun ankoraŭ esti multaj fotoj en la manoj de veteranoj, kiuj vizitis la Zamenhofajn Esperanto-kongresojn 1905-1913. Ni zorgu, ke la ekzistantaj fotoj venu en la manojn de la Esperantistaro. Kaj tio estas ebla, se ni povas reprodukti ilin. Alie ili certe perdiĝos post la morto de la veteranoj. Idealo por la Esperantistoj devas esti kompleta bildaro pri la vivo de Zamenhof en formo de kartoj kaj bildlibro.

Sendu fotojn, kiujn vi posedas, aŭ fotojn, kiujn vi trovas en malnovaj Esperanto-revuoj, al s-ro *Henk Thien*, Uiterwaardenstraat 12/II, Amsterdam, Nederlando.

Li reproduktigos la fotojn kaj resendos la originalojn. Li bezonas fotojn pri Zamenhof-domoj, monumentoj, memortabuloj, pentraĵoj, bustoj, kongresanaroj, Zamenhof kun konataj Esperantistoj k.t.p.

La naciaj Esperanto-revuoj presigu alvokon al sia legantaro helpi ĉi-rilate, por ke la bildaro, kiu estos montrata en Varsovio dum la U.K., estu kiel eble plej granda.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj en La internacia Atlernejo de Helsingör, Danlando, okazos ankaŭ nunjare, 25/7-1/8, do tuj antaŭ UK en Varsovio. Rimarkinde estas, ke jam 27 jarojn sinsekve okazas ĉi tiu feria aranĝo. Multaj miloj da geesperantistoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la terglobo ĉeestis ilin. S-ro Tib. Morariu, Stokholmo, gvidos denove sian preparan kurson por Cseh-metodaj geinstruistoj, f-ino Ida Christensen, Kopenhago, la konversacian kurson, kaj s-ro Sögård, Aarhus, la daŭrigan. Krome faros prelegojn f-ino M. Noll, s-ro L. Friis, kaj aliaj.

La Internaciaj Konkursoj 1959

Stato je la 28-a de februaro

Konkurso I				
	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando	1935	2030	104.90
2.	Belujo	1480	1393	94.12
3.	Svislando	1950	1680	86.15
4.	Britujo	6093	5236	85.93
5.	Svedujo	6420	5150	80.22
6.	Hispanujo	1999	1590	79.54
7.	Nederlando	5119	4000	78.14
8.	Usono	2816	2100	74.57
9.	Franco	7066	5117	72.42
10.	Danlando	2639	1860	70.48
11.	Norvegujo	1991	1125	56.50
12.	Germanujo	6951	3835	55.17
13.	Italujo	3980	2185	54.90
14.	Pollando	6635	3390	51.09
15.	Jugoslavio	5690	2330	40.95
16.	Brazilo	8255	1172	14.20
Konkurso II				
	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2045	177.82
2.	Kanado	435	470	108.04
3.	Portugalujo	615	475	77.24
4.	Izraelo	255	140	54.90
5.	Sudafriko	215	115	53.49
6.	Aŭstralio	1280	586	45.78
7.	Urugvajo	325	145	44.62
8.	Novzelando	878	390	44.42
9.	Aŭstrujo	1360	530	38.97
10.	Islando	270	95	35.19
11.	Argentino	615	120	19.48
12.	Maroko	457	51	11.16

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro!

Korekto

Ni devas informi, ke je nia bedaŭro okazis kelkaj eraroj en la jarfina kalkulo 1958.

En la Konkurso I Svislando atingis 1950 poentojn, anstataŭ 1755. Signifis ke ĝi finis kun 89.24% je la 11-a loko, anstataŭ je la 13-a. En Konkurso II Urugvajo finis kun 325 poentoj anstataŭ kun 275. Sekve ĝi devus ricevi kun 78.50% la 10-an lokon anstataŭ la 11-a. Ni tre petas pardonon pro la malkorektaĵoj. De ambaŭ landoj la kvotoj por 1959 estas konsekvence ŝanĝitaj.

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

NIA FORUMO

INERTA ESPERANTA POPOLO

La esperantistoj estas tre stranga popolo. Ili havas la plej sensentan epidermon el ĉiuj popoloj de la mondo. Kaj ili havas ankaŭ la plej tikiĝeman epidermon el ĉiuj popoloj de la mondo.

Tiu ŝajna paradokso dependas nur de tio, kio tuŝas tiun ilian epidermon.

Se gazetartikoloj, paroladoj, k.s., atakas, tuŝas, pritraktas, aŭ nur aludas, aferojn de la „movado“, de la interna ideo aŭ de tio entenata en la ĝenerala formulo „esperantismo“, tiam ĉiuj viloj de la verdaj homoj hirtiĝas, akriĝas iliaj langoj kaj plumoj, kaj en vere kortuŝa unu-animeco ili fluge kuras por defendi la minacatan fortikaĵmuron.

Same... Ne!... ne same! Sed ankoraŭ pli vigle, pli impete kaj pli furioze, ili ĵetas sin en la batalon, kiam temas pri denova atako, ektuŝo, pritrakto, aŭ nur aludo, en la pure lingvaj aferoj, kiuj, ĉiu scias tion, estas la visceroj de ĉiu konscia esperantisto (kaj kiu esperantisto ne estas konscia esperantisto?) — kaj kiuj same estas lia vivopravigo mem.

Sed se aperas interesa gazetartikolo, se je la nuraj riskoj de kuragulo, eldoniĝas valora verko, ne tuŝantaj la movadon, nek la lingvon! tiam niaj bravaj esperantistoj komferte kaj en rondo dormas, kiel la kato, kies streĉa orelo kribras la sonojn kaj aŭdas nur la danĝerajn.

Jes ja, la recenzistoj faras sian devon: tre lojale ili nombras la paĝojn de la aperinta volumo, notas la preserarojn, pridenuncas la neologismojn, iom rakontas pri la enhavo, kaj la plej kapablaj el ili, cetere malmultaj, fojfoje aldonas vere kritikan (en la arta senco de la vorto) studeton.

Dume la libroj kuŝas sur la bretoj de la eldonisto. Kelkaj el ili vendiĝas, sed ilia enhavo efikas ŝajne kiel dormigilo, ĉar neniam ajn ĝi sukcesas vekti aprobojn, aŭ protestojn, aŭ diskutojn, aŭ refuton. Nenia signo povas suspektigi la interesiĝon — en kiu ajn direkto — de la esperantistoj, por kiuj tamen estis verkita tiu originala verko aŭ poemaro, tiu negurdita artikolo — aŭ skribita tiu someruniversitata prelego.

Verkoj, kiaj "La Infana Raso" de William Auld, "El la Maniko" de Reto Rossetti, "Homoj kaj Riveroj" de Johan Hammond Rosbach, "Kontralte" de Marjorie Boulton aŭ "Eseoj" de Gaston Waringhien, neniam estigis, laŭ mia scio, la plej malgrandan diskutojn en la "Tribuno de la Leganto" de kiu ajn nacia aŭ internacia gazeto*), nek kredeble la plej etan konversacian pritraktadon inter grupo de amikoj.

Ŝajnas al mi, tamen, ke ne mankas en ekz. "Eseoj" okazoj de refleksoj — sed, kiel mi diris, la refleksoj de la esperantistoj estas "kondiĉitaj" nur je la lingvo kaj je la movado.

Cu eblas "kondiĉi" ilin je aliaj temoj ol la ĵus diritaj? Eventualaj reagoj al tiu ĉi ne nur instiga, sed intence incita artikolo alportos la respondon al la demando. Sed multe pli trafaj estus la apero de artikoloj diskutantaj aŭ refutantaj tiun aŭ tiun punkton de "Eseoj" aŭ de "La Infana Raso", kaj plej ĝojiga estus la naskiĝo de vere arta kritiko, eĉ se komence nur timida, sed jam konscia pri sia devo pri la loko atingota en la esperanta vivo.

Al ĉiuj literatur- kaj art-amantoj, al ĉiuj iom nervaj, vervaj kaj sangohavaj esperantistoj mi apelacias... esper-eble ne vane!

Roger Bernard

*) de post la malapero de "Literatura Mondo".

ESPERANTO EN SERVO AL NEESPERANTISTOJ

"Ich dien'" (= mi servas), la devizo, kiun akceptis la kimraj kronprincoj en la jaro 1346 de la ĉeĥa reĝo Johano de Luksemburg, estas ankaŭ principo de esperantistoj. Ili dediĉas multajn fortojn al tiu celo. Servi en aferoj iam eĉ tre malfacilaj estas por ili plezuro, se ili tiamaniere povas pruvi utilon de nia lingvo. UEA-Delegitoj prenas sur sin tiun devon kun akcepto de sia funkcio.

Precipe la Delegitoj povas rakonti pri iuj trouzoj de la esperantista servemo, sed ĝenerale oni pretervidas tiujn mispaŝojn kaj ĝojas, povante aldoni novan ŝtonon en konstruo de la "ĉiopova" Esperanto-organizo.

Venis tamen jam tempo meti limojn al tiu servopreteco kaj rekomendi singardon, ĉar multiĝas okazoj de frapanta malbonuzo de tiu sindono. Samideanoj disponigas siajn lingvon kaj organizon al neesperantistaj institucioj, kiuj tiun subtenon ne meritas.

Jen ekzemplo:

UEA-Delegito ricevis peton de la japana eldonejo Heibonŝa en Tokio kolekti materialon por granda verko, kiun skribu la infanoj pri siaj landoj. La afero aspektis subteninda kaj subskribinto, vivanta tiam en Praha, sen hezito helpis en tiu ĉi tasko kaj liveris amason da kontribuajoj por impona ĉeĥoslovaka parto de la verko. Li foriris al Israelo kaj konsentis fari saman laboron en tiu lando. Li ne ŝparis panon nek elspezon kaj preparis grandajn kolektojn de infanaj verkoj kaj desegnoj, aldonis bonajn fotojn kaj ekspedis ĉion en pluraj sendaĵoj al Tokio.

La redakcio de Heibonŝa vigle korespondis, sed ek-silentis tute, kiam venis la tempo liveri la volumon. Kaŭzon de la silento, kiu daŭras ĝis nun, ekkomprenis la kompilinto de la Israela parto nur post kiam li fine — post ripetaj intervenoj flanke de liaj japanaj amikoj — ricevis la libron proksimume unu jaron post la apero.

En la malriĉe ekipita Israela parto de la verko, kiu pretendas celi pacon, paradas unualoke granda fotograf-aĵo, montranta soldatojn en kirasitaj aŭtomobiloj. Ĝin kaj alian grandformatan maltaŭgan bildon akiris la redakcio el iu neesperantista fonto, el la valora materialo, liverita de UEA-Delegito, kaj kiu povis montri la altan ŝtupon de civilizo, atingitan de tiu ĉi lando, ĝi uzis minimumon da plej sensignifaj bildoj. Simile aspektas la teksta parto pri Israelo. Kontraŭe, al landoj, ĝuantaj simpation de Heibonŝa, estis dediĉita tre dokumentita ampleksa parto de la libro.

Montriĝas, ke temas pri entrepreno partia, kies celo nepre ne estas alproksimigo de la popoloj, kiel ĝi volas krediĝi per siaj antaŭaj proklamoj. Grave eraris la japanaj esperantistoj, kiuj donis sian helpan manon al efektivigo.

El ĉio sekvas postulo, ke aferoj de simila amplekso kaj ŝajna signifo estu la helpopeto akompanata per klara rekomendo de Delegito, komprenanta la principojn de Universala Esperanto-Asocio. Antaŭ dono de tiu rekomendo li studu atente, ĉu la subtenota entrepreno konformas al tiuj principoj.

O. Ginz,
Kirjat Jam

DUM LA ZAMENHOF-JARO
AĈETU LIBROJN!



1



2

- (1) *Krakovo : Kapelo de la reĝo Sigmunt.*
- (2) *Miss Pollando bonvenigas eksterlandajn gastojn.*
- (3) *Varsovio : Kolono de reĝo Sigismunt.*
- (4) *Gdańsk : Neptuno.*
- (5) *Varsovio : Barbakanoj en la malnova kvartalo.*
- (6) *Varsovio : Kastelo de la polaj reĝoj en Vilamur.*
- (7) *Zakopane : Pola montaro (postkongresa ekskurso).*




5




6

BONVENON EN VARSOVIO



3



4



7

Belartaj Konkursoj 1958

B r a n ĉ o : Originala Poezio

Dua Premio

ELEGIO JARFINA

I.

Mia kanto mikshereda kramfe, nemature naskiĝas,
kiel ĉi feniksa jaro kies mitojn ame ĝi volus
elterigi, lingve munti, kvazaŭ antikvajn

ostfragmentojn,
kvazaŭ sonĝojn nekohere memoritajn, tamen
obsedajn.

Kelkaj bildoj jam atendas : akvafortoj de
praskolestro
Emocio — pro virino, pro soleco, aŭ nur persisto
unucentra de poeta cerbo . . kaj tamen ja nemultaj.
Nia jaro submergiĝas, peza je tagoj kaj forgeso,
kiel dubopeza amo. Mia kanto naskiĝas kramfe,
kiel ĉi feniksa jaro, kies sepulitejo ĝi estas.

II.

*Printempon mi ne laŭdis.
Perfida Januaro
sekretojn jam aludis
sur ĉiu streĉa arbo.*

*Marto ne ludis pli ol
la prognozita temo.
Ĉu min ekzaltu tiel
uzurpo kaj kutimo ?*

*Printempo venis. Tamen
ĉi-jare ne laŭfame :
poemo amoporta —*

*nur senrilata fakto,
kiel la naskodato
de iu longe morta.*

III.

Mi aŭdis kantistinon aserti ke juneco
konsistas el vojaĝoj; sed ŝi laŭ ĝusta deco
aludis ne, al kio logiko min instigas :
ke la vojaĝmemoroj maljunon konsistigas,
samkiel mia propra malriĉa elegio,
disere mem vibranta en viva nekonscio,
nur nun en fikson venis en ĉi vesperoj vintraj,
atesti pri sezonoj — sezonoj, ve, pasintaj . . .

Somero. Trifolio por geamantoj kuŝon
vesper-parfumas. Tamen, amiko, ŝian buŝon
eklasu, se vi povas. Ne ofte vi ĉielon
tian revidos, tiun masivan sun-fabelon
kolor-ebrian, kiun maltaŭge nur spegulas
pupiloj ŝiaj noktaj. Rigardu. Maroj brulas !
El ĉi oazo trinku, por ne soifi morgaŭ !
Trinkigu jen memoron; ĝin banu jen ankoraŭ
en ĉi purpurriveron, ĝis fine viaj tagoj
pro sonĝoj superfluos, la sonĝoj pro imagoj . . .
sorbu ĉe via vojo — ĉi vojo al dezerto —
flugilojn papiliajn, okulojn de lacerto,
melankolion likvan de akvo-birda voko :
ĉar kisoj ne kuracos la brulon de siroko.
Trinku ! ĉar vi bezonos, por ŝtofo de miraĝoj,
ĉi bildoriĉan vinon, junecon el vojaĝoj.

IV.

*Septembro portis pluvon. Kaj pro la pluvo
la brunaj vejnoj de la tero
ekkongestiĝis kaj forŝovis fine
la placenton de somero.*

*Salikfolioj kiel malpezaj horoj
sur sia lasta lito glitis,
en kiu mi, regato de aŭtuno,
jaro-hekatombojn vidis.*

*Kiom da palaj sonĝoj perditaj kuŝas
sub vitra vintro de rivero ?
Kiom da miaj floroj mi konservos
el abundo de somero ?*

V.

Kiam nun la mevoj ŝvebas, serĉe, animoj
maltrankvilaj,
en ĉi tiuj ostoj ankaŭ eĥas iliaj grakoj akraj.
Super niaj stratoj vakaj voĉoj ventoraŭkaj rikanas,
kaj laŭ miaj paŝoj vagaj flugoj petolkonsternaj
teksas
rete strangajn simpatiojn. Fine, malriĉa, mi revenis
al figuro preferita, kiel mevo laca je fremdaj
ventoj al konata ŝtono, kiel mem la jaro, aĝulo
ripetema. Mi subfosis lian ŝimon, palpis en liaj
moroj kaj humoroj, pene mi penetris kaŝe kaŝejojn
liajn, nur por trovi centron de ĉi tiu senstela lando.
Povas esti, ke neniam koro misritma, burĝonanta
sole kun folioj mortaj, tiun sovaĝejon atingos —
kvankam foje, tra la stratoj de la menso, mi kredis
aŭdi
voĉon jam perditan, kaj ĝin konis, kaj ne povis
eldiri.

Povas esti ke finfine, pastro insula, ĉi herezan
misesperon mi rezignu, veni al Argos, kien flugas
la fenikopteroj flamaj — kaj la koron en fremdan
ritmon
bridu, por kunhimni, kaj al Januaro diri : saluton.

Victor Sadler

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

SCIENCAJ STUDOJ* bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj. Eldonita okaze de la 50-jara jubileo de ISAE sub redakto de P. Neergaard, Kopenhago, 1958. 242 p. en formato 18 × 25 cm. Prezo: 15.- gld.

Por plua disvastigo de Esperanto estas grave, ke multiĝu ĝiaj diversspecaj aplikoj en praktika vivo. Esperanto pli kaj pli utilu kiel instrumento de internacia interkompreno en diversaj medioj. Scienco estas la medio, kie la apliko estas speciale grava. *Scienca Revuo*, originalaj sciencaj verkoj, similaj al la libroj de P. Neergaard, tradukitaj verkoj, similaj al *Kon-Tiki*, estas valora pliriĝo de nia Esperantoliteraturo. La recenzata volumo estas tute nova tipo de sciencaj eldonaĵoj en Esperanto. Ĝi aperis okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj enhavas antaŭparolon de prof. d-ro S. Nishi, prezidanto de ISAE, redakcian noton de d-ro P. Neergaard, ankaŭ ties *Retrospektivan rigardon al 50 jaroj da apliko de Esperanto en la scienco* kaj 36 originalajn sciencajn artikolojn pri diversaj sciencaj fakoj. La artikoloj estas destinitaj precipe al fakuloj, sed multaj el ili vekos intereson de multaj sciencamantoj-nefakuloj.

En humanisma parto de la volumo ok artikoloj temas pri lingvoscienco. Tio estas tute komprenebla fakto, ĉar inter esperantistoj intereso al lingvaj problemoj estas ĉiam granda. Tre grava laŭ teoria kaj praktika vidpunkto la artikolo de G. Waringhien pri vortstatistika problemo, kiu agnoskante gravecon de vortstatistika metodo, tute prave montras ĝian praktikan relativecon. Same V. Setälä prilumas seriozan metodologian problemon pri kategorieco kaj gramatika klasifiko de vortoj, kiu havas ne nur ĝenerallingvosciencan, sed ankaŭ esperantologian signifon. E. Wüster, kiel ĉiam, ĝisfunde esploras la problemon pri internaciaj simboloj por lingvoj. Tre atentinda estas la artikolo de W. E. Collinson pri "idiotismoj" en naciaj lingvoj kun koncernaj aludoj pri Esperanto. W. J. A. Manders en sia artikolo karakterizas *Lingua Ignota* de Hildegardis, kiu estas iafaje citata en historio de internacilingvaj projektoj, sed ne sufiĉe fidinde. Grandan intereson de legantoj vekas la artikolo de Je Laishi pri la reformo de la ĉina skriblingvo. Por fakuloj estas interesaj la artikoloj de

E. Privat pri verboj de Shakespeare kaj de V. P. Grigorjev pri "kuniga vokalo" en moderna rusa lingvo, sed speciala karaktero de tiuj temoj tute ne malgrandigas ilian sciencajn valoron kaj signifon por scienca Esperantoliteraturo. Al problemoj de filologio kaj belliteraturo estas dediĉitaj kvin artikoloj (E. Viborg, E. Migliorini, J. R. Pérez, S. Djoudjeff kaj M. Boulton). Ili ĉiuj havas intereson ne nur por fakuloj, sed ankaŭ por ĉiuj literaturamantoj. En tiu parto de la volumo estas lokitaj ankaŭ la artikolo pri jura scienco de I. Lapenna, pri psikologio de C. J. Adcock. Ne ĉiuj humanismaj sciencoj estas bone reprezentitaj en la recenzata volumo. Mankas artikoloj pri ekonomio, filozofio. Ne sufiĉe estas tuzitaj historiaj kaj belliteraturaj temoj.

En matematik-naturscienca parto estas reprezentitaj tre diversaj sciencoj. Sufiĉe riĉa estas kolekto de artikoloj pri biologiaj sciencoj (malpli pri zoologio, ol pri botaniko). Inter ili la artikoloj de G. F. Makkink, R. A. Lewin, P. Neergaard, C. A. Klang, Hidemiti Oka, C. Støp-Bowitz, E. Balech, S. Kawamura. Al praktikaj branĉoj de biologio estas dediĉitaj la artikoloj de E. Jouis, H. Hasimoto, H. Shinoda, S. Nishi. Bone estas reprezentita ankaŭ astronomio per la artikoloj de Y. Väisälä, B. Popoviĉ, P. Kustaanheimo. Al kemio estas dediĉita la artikolo de W. J. Nijveld, al geologio — la artikoloj de H. Rosendahl, kaj de A. Sugimura, al kristalografio — la artikolo de P. Hartman, al matematiko — la artikolo de M. Fréchet, al fiziko — la artikolo de H. Sirk. Estas okulfrapa, ke preskaŭ tute neglektitaj estas teknikaj branĉoj de scienco. Mankas artikoloj pri elektrotekniko, kibernetiko, atomfiziko. Tute ne sufiĉe estas reprezentitaj fiziko, ĥemio.

Tamen dezirindaĵoj povas esti senfinaj. Do ni taksu la recenzatan volumon tia, kia ĝi estas. Kaj ni plenrajte povas diri, ke ĝi estas vere leginda, vere valora, vere impona. Ni estu tre dankemaj al la iniciatinto-redaktoro kaj partoprenintoj-aŭtoroj, kiuj donis al esperantistaro tiom utilan verkon, okulfrape montrantan la eblon de utiligo de Esperanto en scienco. Ni esperu, ke tiu eldono estos daŭrigata.

Prof. d-ro E. Bokarev

50-JARA JUBILEO DE K.E.K. Verkita de Margrethe Noll kaj Gustav Kühlmann. Eld. Konversacia Esperantista Klubo, Kopenhago, 1958. 45 p. 24 × 15.5. Prezo: 5 dkr.

Okaze de sia 50-jara jubileo, Konversacia Esperantista Klubo en Kopenhago eldonis bele presitan kaj redaktitan libreton pri la historio de la klubo. Ĉiu, kiu interesigas pri la interna vivo de la movado, precipe pri la fruaj tagoj, volonte posedos ĝin. Certe la pioniroj de KEK havis la ĝustan ideon: *La unua estraro estis tre severa. La klubmembroj devis trapasi malgrandan buŝan ekzamenon por konstati, ĉu ili povas kompreni kaj respondi al demandoj en Esperanto, kaj la estraranoj rondiris inter la klubanoj por subaŭskulti, ĉu ili parolas la danan lingvon. Ĉiun jaŭdon okazis kunvenoj en Kongens Nytorv 8, kaj la severa regado de la klubo kaŭzis, ke oni vere povis paroli Esperanton post la unua vintra sezono (p. 10-11). Tio ŝajnas al mi ekzemplo ankaŭ hodiaŭ imitinda en niaj kluboj. Alia interesa aranĝo koncernas la kluban bibliotekon, kiu kunlaboras kun "Statens Bibliotekstilsyn (biblioteko kontrolorganizo de la stato) tiel, ke ĉiu, ĉu esperantisto aŭ ne, kie ajn loĝanta en la lando pere de sia komunuma biblioteko povas pruntepreni el la kluba biblioteko (p. 34). Ankaŭ tiu aranĝo ŝajnas al mi imitinda, en landoj kie io simila estas arangebla.*

Pavilono (p. 15) estas verŝajne pavilono, sed mi ne scias, kio estas translatoro (p. 7).

W. A.

CURSO DE ESPERANTO EM 20 LIÇÕES de A. Couto Fernandes kaj H. Mota Mendes. 6a eld. Brazila Esperanto-Ligo. Prezo gld. 0.95, steloj 3.80

La portugallingva *Curso de Esperanto* sekvas la modelon por memlernado, rutinan de multaj jaroj, kun divido en 20 lecionojn, kiuj enhavas tekston kun gramatikaj reguloj kaj ekzercojn.

Ĝis nun, mi neniam trovis nacilingvan (aŭ eĉ Esperantlingvan) lernolibron de Esperanto, prezenti la fenomenon Esperanto kiel efektivan geston intervoĉan, en ĝusta strukturo kaj el trafa lingvistika (kaj pedagogia) starpunkto. Ne estas escepto la monumenta *Plena Gramatiko*, kiu prezentas Esperanton laŭ tute erara koncepto, devena de l'antaŭjuĝoj de mezepokaj latinaj gramatikoj; kaj ne estas escepto ankaŭ tiu ĉi malgranda kurso por memlernantoj, kie la materioj antaŭenruliĝas laŭ ordo ne tute taŭga pro progresiva memlernado. Tamen, kelkaj bonaj rimarkendas en ĝi, kompare kun aliaj portugallingvaj lernolibroj samecaj, kaj tiuj estas:

a) La ekzercojn konsistigas precipe tekstoj de Esperanta Literaturo (kompreneble facilaj), anstataŭ skribaĵoj libere elpensitaj de l'aŭtoroj; tio, evidente, ebligas la enkondukon de la lernanto en la kulturon en Esperanto.

b) La ekzercoj, je la fino de ĉiu leciono, ne havas apartan vortareton apudan, sed la ĝenerala vortareto Port.-Esp. kaj Esp.-Port. troviĝas komplete je la fino de l'volumo, — kio devigas la lernanton trafoliumi la libron ĉe ĉiu ekzercita temo, kaj tio ebligas al li pli fruktodonan konadon de la lernilo.

Krome, la reguloj estas ĝuste donitaj, kaj la volumo permesas, entute, ke iu ellerninta ĝin restu kun sufiĉe solida baza kono de la lingvo, — kaj tio certe gravas en la takso de tiu speciaj verkoj!

Antônio de Macedo.

**ESPERANTO TRA LA MONDO—
ESPERANTO A TRAVERS DEL MUNDO.** Kompilis Consuelo de Sanchez-Latour. Prologo de Angelina Acuña. 23 × 15 cm, 560 pĝ. Guatemala. Tipografía Nacional de Guatemala 1958. Ne vendata.

Dum la jaro 1957 mi ricevis ĉarman leteron el Gvatemalo, de same ĉarma Sinjorino Consuelo de Sanchez-Latour, kiu invitis min (kiel aliajn samideanojn en la tuta mondo) diri tion, kion ni scias pri Gvatemalo, kaj samtempe jom rakonti pri la propra lando. Estas propaganda libro grandstila. La respondoj al la invito estas represataj kun hispanlingva traduko kaj kun fotoj de la respondintoj. Plie enestas aro da artikoloj de enlandaj Esperantistoj pri Gvatemalo, ĝia loĝantaro, ĝiaj produktoj, floraro, bestaro k.a. Legindaj speciale la ĉapitroj pri la pasinteco indiana, ĉi tiuj gigantaj konstruaĵoj monolitaj, strangaj kiel la nomoj de lokoj, plejofte klarigataj en la tekstoj. Entute interesega libro presita je la ŝarĝo de la ŝtato. Certe estas amatoroj por tia dokumenta libro, lingve tute rekomendinda, valora por personoj kiuj interesigas ankaŭ pri la hispana lingvo. Gratulinda estas la kompilinto kiu kun granda diligento kaj patrina zorgemo kunmetis tiun ĉi libron dediĉitan memore al Sinjoro Francisco Sanchez-Latour, bopatro de Sinjorino Consuelo.

Hans Jakob.

GRAMÁTICA SINÓPTICA DE ESPERANTO de Mário Ritter Nunes. Brazila Esperanto-Ligo. Eldonejo: Brazila Esperanto-Ligo*. Prezo glđ. 0.95.

Tiu ĉi *Gramática Sinóptica* (Sinoptika Gramatiko de Esperanto) estis simpla aranĝo tabela de la morfemoj kaj strukturiloj de Esperanto. Ĝi konsistigas bildon interesan kaj klaran pri la interrilatoj de l'organaro de la lingvo, kaj indikon rapide konsulteban pri l' diversaj uzoj de la elementoj de Esperanto. La ideo de l'aŭtoro redukti la tutan gramatikon je tabeloj, obeas, laŭ lia propra aserto en la antaŭparolo, al la intenco pruvi tiun malnovan propagandafon, ke Esperanto "ne havas esceptojn". Komprenibile la afero eĉ ne estas diskutinda, ĉar ĉiu scias ke Esperanto fakte havas esceptojn. Oni

pensu, ekz., pri frazoj kiel: "Mi vidas unuajn kaj aliajn", — kvankam oni ne povas diri: "Mi vidas unun kaj alian". Ĝenerale, kiam oni parolas pri "nesceptoj" rilate al Esperanto, kutime la afero temas pri respondo de morfemo al funkcio; ekz., la funkcio *verba infinitivo*, kiu en Esperanto havas nur la respondan morfemon *-i*, havas france plurajn respondajn morfemojn: *-er (aimer)*, *-ir (finir)*, *-re (prendre)*. T.e. la franca lingvo ne havas, tiel neta kiel vidiĝas en Esperanto, la rilaton *morfemo-funkcio*, ĉar, ni konstatis, al sama funkcio povas respondi pluraj morfemoj. Certe, la malo ankaŭ povas okaze, t.e. unu morfemo povas respondi al diversaj funkcioj; ni citu la anglan *-s*, kiu povas esti: signo de pluralo (*trees*), signo de 3-a persono de la indikativa prezenco (*loves*), signo de genitivo (*friend's*), ktp. Kvankam ne tiom produktiva je tiaj amasiĝoj (morfemaj aŭ funkciaj), nia Esperanto ankaŭ posedas tiu speciajn "esceptojn": ni memoru ekz. pri la malsamaj funkcioj, kiujn povas plenumi la morfemo *-n* tempa adjekto, rekta objekto, direkto, ktp.).

Per ĉio ĉi mi deziras nur averti, ke la prezento de Esperanto al moderna publiko laŭ trudaspekto *matematike fleksebla* (laŭ modo de tradicia kantismo), estas grava eraro eĉ el propaganda vidpunkto, ne nur ĉar ĝi estas mensogo evidentiganta al iu ajn lerninta la lingvon, — sed ankaŭ ĉar hodiaŭ, precipe pro influo de fenomenologio kaj ekzistenciala filozofio, oni emas konsideri la lingvojn ne kiel ilojn sed kiel "poezian" (el *poiesis*) agesencon de l'homa ado-en-la-mondo.

Antônio de Macedo

URBO NITERÓI. Turisma propaganda albumo kun 8-paĝa teksto kaj 30 ilustraĵoj. Formato 212 mm ĝ 200 mm.

Laŭ klarigo en antaŭparolo, tiun ĉi albumon organizis la Niterói-Esperanto Klubo kaj ĝin eldonis la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko okaze de la XVa Brazila Kongreso de Esperanto. La tekston, en portugala lingvo kaj en Esperanto, verkis Renato de Lacerda, ano de la Beletristika Akademio.

Tiu ĉi eldonaĵo celas konigi inter la tutmonda esperantistaro kelkajn karakterizaĵojn de brazilaj ĉefurboj. La albumo estas bonaspekta, nete presita kaj la 30 fotoj en ĝi entenataj sufiĉe efikaj por doni ideon pri la belaĵoj de Niterói — oficialaj palacoj, ĝardenoj, plaĝoj, preĝejoj, monumentoj.

La brazilaj esperantistoj estas agemaj kaj fervoraj. De longe ili estas montrintaj siajn kapablojn en la propagando de nia lingvo. Sed ili volas pli ol tio: — ili volas ankaŭ, ke la mondo konu ilian landon kaj la nuna albumo estas elokventa pruvo de tiu aspiro. Tiamaniere ili utilas kaj al Esperanto kaj al Brazilo.

La teksto konsistas el resuma historio de la urbo Niterói, sufiĉa por ke iu havu rapidan imagon pri ĝi.

Traduko bona; mi memoras esti vidinta apenaŭ du mankojn de akuzativo; cetere tio povas esti simplaj preseraroj.

Luzo Bemaldo

CHAVE DO ESPERANTO* (Esperanto-ŝlosilo). Eldono de Brazila Esperanto-Ligo. Prezo Kr. \$ 5,00 aŭ St. 0,60 aŭ egalvaloro.

Je la unua fojo eldoniĝis en Brazilo Esperanto-ŝlosilo en portugala lingvo, precize en la kutimaj formato kaj presarango. Tial nenio speciala rimarkinda en tiu ĉi eldono. Kiel en la antaŭa, ĝi havas, krom liston de 2.500 radikoj de la kuranta lingvaĵo, alian liston de pli ol 300 komercaj terminoj. La informoj pri la Esperanta movado en Brazilo estas memkompreneble pli longaj ol en la antaŭa eldono de la portugala ŝlosilo, dum la informoj pri la movado en Portugalujo estas mallongajn sed pri tio ne estas kulpa la eldoninto sed la politika situacio en Portugalujo, kiu ne permesas tute liberan disvastiĝon de nia lingvo en sia teritorio.

La Esperantaj ŝlosiloj, elpensitaj de Ĉefeĉ jam antaŭ pli ol 50 jaroj, daŭrigas sian nerefuteblan utilon. Ili estas tiel efikaj en la manoj de niaj propagandistoj kiel en la manoj de Esperanto-uzantoj.

Luzo Bemaldo

ITALAJ RAKONTOJ* de Edmundo de Amicis. El la itala trad. Dr. P. C. Mondì. Eld. Paulet, S. Vito al Tagliamento, 2a eld., 1957, 79 p. 12 x 17.

La libro „Koro“ de Edmondo de Amicis okupas en la itala literaturo iom la saman lokon kiun en la angla havas „Alico en Mirlando“, t.e. ĝi estas samtempe porinfana kaj klasika. Laŭteme tamen ĝi multe diferencas, havante kiel celon ne nur distri, sed ankaŭ edifi. En 1922 D-ro Monti tradukis ses el la naŭ „monataj rakontoj“, pro kiuj la libro aparte famiĝis (la okan, „De la Apeninoj al la Andoj“, tradukis Castagnino antaŭ 1933); kaj de tiu libro ni bonvenigas nun la duan eldonon.

Gepatroj de Esperantistoj ofte plendas pri la manko de porinfanaj libroj en la dua lingvo. Por iom pli aĝaj infanoj, ankoraŭ impreseblaj per rakontoj pri kuraĝo kaj sinofero, jen legajo

A Key to Esperanto* (Esperanto-ŝlosilo). Angla. The British Esperanto Association Inc., 140 Holland Park Avenue, London, W 11. 30 paĝoj. Prezo 3 pencoj.

La ŝlosilo enhavas la elementajn regulojn de la Internacia lingvo, vortaron kaj enkondukon, kiu enhavas ekz. la UNESKO-rezolucion de Montevideo.

El Germanujo: bela 28-paĝa broŝuro pri Saarbrücken kun Esperanta aldona folio rakontanta pri la "industri- kaj

limurbo inter verdaĵoj". Senpage ricevebla per Jacob Schenkel, Neu-Aschbach, Post Klarenthal/Saar, Am Ziegelhof 30, Germanujo.

SAKLUDADO* de Josefo Giacosa. Dua eldono. Esperantigis verse Fratoj P. kaj R. Padulli. Eldonis A. Paolet - S. Vito al Tagliamento, Italujo. 1957. 47 paĝoj.

Temas pri versa drameto kun prologo, kie la aŭtoro eksplikas siajn motivojn, prenitajn el 14-jarcenta romano. Nobelo Renato loĝas kun sia sola filino, Jolando, en sia kastelo kaj havas zorgojn pro sia maljunaĝo kaj la obstino de Jolando kontraŭ edziĝo. Ŝi atendas la "princon de siaj sonĝoj", kiu fine aperas en formo de la paĝio de grafo Olivero. Fernando, la paĝio, ofendas maljunan Renaton per sia bombasto kaj akceptas proponon de Renato ŝakludi kun Jolando, kiu estas lerta ŝakludantino. Se li venkos li gajnos Jolandon kiel edzinon, se male, li mortu. Vidante, ke Fernando evidente malgajnos, Renato bedaŭras sian severecon kaj proponas nuligon de la kondiĉoj, kion Fernando tamen rifuzas. Jolando ekscias pri la kondiĉoj kaj ruze aranĝas tiel, ke Fernando tamen venkas la ludon, kaj la drameto fermiĝas en feliĉo.

El literatura vidpunkto la verketo ŝajnas senvalora kaj estas malfacile kompreni, al kio profitas ties traduko en la Internacian lingvon. La temo impresas anakronisme en pli ol unu senco kaj la versa vesto Esperanta neniel eĉ margenas moderan artisman. Mankas absolute harmonio inter akcentaj kaj senakcentaj silaboj kaj la rimoj svarme adasismas. La lingvaĵo tamen gramatike ĝustas, kvankam foje oblikva. Preseraroj estas malmultaj sed memevidentaj, ekz. venedas = venadas, p. 15, men = mem, p. 27. La majusklo komence de ĉiu verslinio estas evitenda en la Internacia lingvo.

B. R.

La apero de la Sankta virgulino. — Eldonita de la Fratoj de la Karitato, Stropstrato 127, Gent, Belgujo, 1956. 24 p. 23 × 15 cm. Senpage havebla ĉe la eldonintoj, aldonante, se eble, 1 internacian respondkuponon por poŝtelspezoj.

GRAJNOJ EN VENTO

Laŭ la iniciato de s-ro Marcel Erbetta ĉiujare aperas pluraj numeroj de "Graĵnoj en Vento", la gazeto kiu kunligas la lerneajn rondojn per Esperanto tra la mondo. Instruistoj kaj kursgvidantoj, via grupo nepre partoprenu en la tutmondaj interlernejaj rondoj "Graĵnoj en Vento"! Ĝuos ne nur viaj gelernantoj, sed ankaŭ vi mem. Petu la necesajn informojn — aldonante internacian respondkuponon — ĉe Marcel Erbetta, Rue des Pins 66, Bienne-Biel 7, Svislando (Suisse).

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice,

Ĉeĥoslovakujo

ESPERANTA ŜAK-LIGO INTERNACIA fondita.

La 5-an de aŭgusto 1958 okazis en Mainz fonda kunveno de Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (ESLI). La kunveno, kiu estis organizita en kadro de la 43-a UK, partoprenis 15 personoj el 8 landoj. La kunveno pritraktis la nunan staton de Esperanto-ŝaka movado, decidis tuj fondi la ligon kaj akceptis ĝian provizoran statuton. Laŭ ĝi estis tuj elektita estraro, kies oficperiodo daŭras tri jarojn (de 1-1-1959 ĝis 31-12-1961). En la estraron oni elektis:

Prezidanto: *Torsten Lindberg, Präsesebo, Svedujo.*

Sekretario (kaj provizore ankaŭ vicprezidanto) D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.

Kasisto kaj Turnirgvidanto, Jean Duthilleul, 35 rue de Bayeux.

Estrarano, Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København-Brønshøj, Danlando.

D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo, sekretario (kaj provizore ankaŭ vicprezidanto).

Jean Duthilleul, 35 rue de Bayeux, Caen, Francujo, kasisto kaj turnirgvidanto.

Sven Ziegler, Bjernedevej 62, København-Brønshøj, Danlando, estrarano.

La fonda kunveno komisiis al la estraro daŭrigi la laboron rilate eventualan eldonadon de la revuo, zorgi pri korespondturniroj, pri eldono de fakterminaro kaj pri kunlaboro kun blindaj Esperanto-ŝakistoj. La estraro estis ankaŭ komisiita pritrakti aliĝon al UEA kaj interrilati kun FIDE kaj ICCF kaj kun iliaj oficialaj revuoj. La kunveno fiksas jarkotizon je 1 dolaro (4 DM) jare. ESLI ĝustatempe informos siajn anojn pri pagejoj.

La fonda kunveno, konsciante pri grava helpo, kiun donis al nia laboro la renovigo de ŝaka rubriko en revuo *Esperanto*, sendis al ĝia tiama redaktoro, s-ro W. Auld, dankleteron.

La nova estraro de ESLI oficiale eklaboris la 1-an de januaro 1959. Ĝi esperas, ke ĉiuj Esperanto-ŝakistoj subtenos ĝian laboron, ĉar la celo, kiun ESLI starigis antaŭ sin, certe estas komuna celo de ĉiuj esperanto-ŝakistoj. En provizora statuto estas la celo de ESLI fiksita jene:

a. grupigi ĉiujn ŝakistojn, kiuj konas la internacian lingvon Esperanto kaj ebligis al ili amikajn ŝakajn rilatojn,

b. propagandi la internacian lingvon Esperanto inter ŝakistoj en la tuta mondo,

c. eldoni ŝakan revuon en Esperanto,

d. eldoni ŝakajn librojn en Esperanto.

Korespondturniroj de ESLI jam funkcias. Se vi volas partopreni, skribu al turnirgvidanto, s-ro J. Duthilleul (adreson vidu supre!). Aliĝkotizo estas 10 poŝtaj respondkuponoj (el landoj, kie ne validas rk., oni provizore pagas nenion).

Solvoj de niaj problemoj:

N-ro 3: Ĉ g5—e6.

N-ro 4: K h8—f6.

N-ro 5: D g6—c2.

La problemoj ŝajne estis iom tro malfacilaj por niaj amikoj, ĉar venis nur nemultaj solvoj, — kaj el ili pli ol duono neĝustaj. Hodiaŭ ni do publikigas pli facilan problemon kaj ni esperas, ke ree venos pli multaj solvoj. Ek de la hodiaŭa problemo ni ĉiam publikigos la nomojn de solvintoj.

Problemo n-ro 6:

J. Aizikowicz, Haifa, Izrael.


Mato en du movoj.

Kontrolo: Bl.: Ra5, Db1, Ta7, Ĉc2, p. c5 (5).

Ni.: Rc6, p. b5, d5, d6 (4).

Solvojn sendu al la gvidanto de nia rubriko ĝis 30.6.1959.

Ek de nun ree aperados nia rubriko se eble ĉiun duan monaton. Ni vere tre dezirus scii, kiel grandan legantaron ĝi havas. Ni petas do ĉiun ŝakiston, kiu sekvas nian rubrikon, ke li afable skribu al gvidanto de nia rubriko. Skribu vian kritikon, viajn proponojn — kaj ĉefe: kunlaboru kun ni. Sendu partiojn, problemojn, artikolojn!



Aperontaj libroj :

KIU ESTAS KIU

EN LA ESPERANTO-MOVADO ?

Por forigi evidentan mankon en nia dokumenta literaturo la eldonisto J. Régulo Pérez, eldonanto de la Stafeto-serio, prenis sur sin la taskon eldoni libron kun la supra titolo (laŭ la multe uzata *Who is Who?*: ekonomia-politika-diplomata eldonaĵo). La *Kiu estas Kiu?* esperantista celas doni fidindajn koncizajn informojn pri pasintaj pioniroj kaj nuntempaj aktivuloj, kiuj iel koninde kontribuis al nia movado. La skemo estas proksimume jena :

Nomo(j) — antaŭnomo(j), eventuale pseŭdonimo(j).

Dato (tago, monato, jaro) kaj loko de naskiĝo, ev. de morto.

Studo(j), ev. ankaŭ ŝatokupo(j).

Civila kariero, laboro, kutimaj okupiĝoj.

Agado por Esperanto, kun precizaj indikoj pri lokoj, jaroj ktp.

Verkaro, kun indiko de kompleta titolo de la pecoj, loko kaj jaro de eldono, ev. numero de eldonoj de ĉiu peco kun pli ol unu.

Notindaj apartaĵoj aŭ aldonaĵoj.

Ĉio en konciza, telegrafa, leksikona maniero, sed sufiĉe klare, por eviti denovan enketon pro dubaj punktoj. La tekston, ĉe plej konataj gravuloj, akompanu bona pasportformata bildo por ornami la biografieton.

Redaktas la libron la estinta Direktoro de UEA S-ro Hans Jakob, Palais Wilson, Genève, Svislando. La estraro de UEA rajtigis lin uzi la riĉan materialon de la UEA-Biblioteko en Genevo; plie la redaktoro disponas ampleksan dokumentaron el la redakcio de la *Enciklopedio de Esperanto*.

Temas pri kolektiva verko, kaj la bonvola kunhelpo de ĉiuj estas insiste petata. Ideojn kaj konsilojn plezure ricevos la redaktoro. Antaŭvideble la libro devas esti finredaktita kaj presita ĝis la fino de 1960 (sub la kutima rezervo, bone komprenita).

DRAMAJ KAJ SKEĈOJ DE MARJORIE BOULTON

Virino ĉe la landlimo estas la titolo de kolekto de dramoj kaj skeĉoj, kiun nia konata poetino Marjorie Boulton publikigis en la 5-a volumo de la KOKO-serio. (Petu la eldonprospekton de Eldonejo KOKO, Dyblandsvängen 7, Brønshøj, Danlando).

La poŝtmarkkolektado

Venas multe da poŝtmarkoj de tuta Eŭropo. Informa artikolo aperos en la maja numero de nia revuo. Sendu daŭre al P. Zacho, Randbølvej 4, Kopenhago F., Danlando.

Registrado de manuskriptoj

La Internacia Verkista Asocio (adreso: Knockfarril, Thornside Road, JOHNSTONE, Renfrewshire, Skotlando) registras manuskriptojn de voluma amplekso, kiuj ankoraŭ ne trovis eldoniston. Posedantoj de tiaj manuskriptoj estas petataj sendi al la Asocio la sekvantajn informojn (manuskriptojn oni ne sendu!).

Se la volumo estas originale verkita en Esperanto: nomo de la aŭtoro; titolo de la libro; proksimuma longeco; 2-3 linia priskribo de la enhavo. Se la volumo estas tradukita, oni deziras la suprajn informojn plus: nomo de la tradukinto; originala lingvo; originala titolo.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

		Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.
Ĉiutage	9.00-9.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3º-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 39.11m, 30.93m. P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	00.45-01.00	(Horo varibla dum unuhora diverslingva programo). Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50	Wien, 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 49m., 41m., 30m., 25m., 18m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.20m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato). Radio I.B.R.A., Poŝtako 821, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.50-23.00	Hilversum, 298m. (1007 kcs), I, V.A.R.A., Heuveillaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. K.R.O., Emmastraat 52, Nederlando.

Radio Roma. 3-IV, Italujo kaj W. Shakespeare; 7-IV, Tra la literaturo; 10-IV, Leterkesto kaj bibliografio; 14-IV, L. L. Zamenhof, okaze de la 42-a datreveno de la morto; 17-IV, Novaĵoj el Italujo; 21-IV, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-IV, Naskiĝo de Romo; 28-IV, Itala belarta urbo Siena. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 2-IV, Sercaj anekdotoj; 9-IV, Radio-dialogo: "Du generacioj"; 16-IV, Memore al la mortotago de la Majstro; 23-IV, Laboristoj parolas pri sia memmastrumado; 30-IV, Primovadaĵoj novaĵoj kaj respondoj al korespondantoj.



44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1.-8. aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko

JOZEF CYRANKIEWICZ

Adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio.

Teleg. : Esperanto-Kongreso, Warszawa.

Banko : Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII O.M. 153--9-525.

N-ro 6

Marto, 1959

MONATA KOMUNIKO

Novaj fakkunsidoj :

Anoncas fakkunsidojn :

Internacia Geografa Asocio. Jarkunveno. Adreso : Tibor Sekelj, Kondina 24, Beogrado, Jugoslavio.

Kristana Esperantista Ligo Internacia : "La problemoj de la rasoj kaj la Biblio". Adreso : D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

Internacia Ligo Esperantistaj Instruistoj : "Kial vi decidis esti instruisto ? Kiuj estas la bonaĵoj kaj la malbonaĵoj de la profesio ?"

Societo de Gefratoj : "Fratecaj Komunumoj en la Nuntempa Mondo". Adreso : Societo de Gefratoj, Wheat-hill Bruderhof, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Britujo.

Veterana Esperantista Klubo : "Raportoj pri fruajaroj de la Movado". Adreso : S-ro Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave. Dunstable 674, Britujo.

Universala Framasonaro : "Kondiĉoj de daŭra paco". Adreso : S-ro E. Gasse, B.P. 452, Le Havre, Francujo.

Kooperativistaj esperantistoj. Adreso : Vilho Salonen, Sepänkatu 4-8 C 51, Tampere, Finnlando.

Tendumejo :

Kongresanoj, kiuj alvenos kun tendoj aŭ kun tren-dometoj kaj deziras tendumi dum la Kongreso, havos je sia dispono rezervitan lokon. Detaloj en la Dua Bulteno.

Diservoj :

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista zorgos Meson en la preĝejo de Nia Savinto en Placo de la Savinto kun prediko en la Internacia Lingvo.

Dum la Kongreso Intereklezia Eku-menika Movado en Pollando okazigos esperantlingve ekumenikan diservon en la preĝejo ĉe Kredytova str. 2/4.

Valutoj :

Ekzistas neniuj limigoj por importado de eksterlanda valuto en Pollando Ĉiu kongresano povos kunporti en libera kvanto kiun ajn devizon. Kurzo: 1 us. \$ (aŭ egalvaloro) = 24 zlotoj.

Chopin-koncerto :

La konata hungara pianisto, Imre Ungar, akceptis la inviton de la Loka Kongresa Komitato ludi Chopin-koncerton en Jelazova Vola, naskiĝurbo de Chopin, okaze de la tutaga kongresa ekskurso.

Somera Universitato :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, direktoro de la Jurmedicina Instituto en Torino, prelegos pri : "Praktikaj aplikadoj de l'sekva diagnozo en ĉeloj".

Statistiko :

(ĝis fino de februaro) : Arabio 1, Argentino 2, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 29, Belgujo 22, Brazilo 3, Britujo 67, Bulgarujo 6, Ĉeĥoslovakio 3, Ĉeĵono 1, Danlando 44, Etiopio 1, Finnlando 19, Francujo 77, Germanujo 71, Hispanujo 9, Islando 2, Indonezio 1, Italujo 75, Izraelo 4, Japanujo 3, Jugoslavio 29, Kanado 1, Maroko 2, Meksiko 2, Monako 5, Nederlando 50, Norvegujo 9, Novzelando 4, Pollando 728, Portugalujo 2, Sovetunio 5, Sudafriko 2, Svedujo 84, Svisujo 18, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 9. Entute el 38 landoj 1404. (Pasintjaro el 31 landoj 1091).

Konstanta Kongresa Sekretario,

G. C. Fighiera.

Prezidanto de L.K.K. A. Rajski.

Instruistaj kunvenoj dum la U. K.. Varsovio

Por bone aranĝi la kunvenojn, la helpo de gekolegoj estas petata.

A) La ĉefa ero de la *Aferkunveno* estos "Unujara Kurso por Lernejanoj - aktuala sperto". La Sekretario de I.L.E.I. bonvenigas informojn jene : a) Nomo kaj grado de lernejo, b) programo, c) lernolibro, se uzata, d) aĝo kaj sekso de lernejanoj, e) nombro da lecionoj, f) komentoj.

B) La temo por la *Pedagogia Diskutado* estos : "Kial vi decidis esti instruisto ? Bonaĵoj kaj malbonaĵoj de la Profesio".

Lastatempe la malabundo de geinstruistoj kondukis al serioza enketado pri la kialoj. Sed la alia flanko de la afero ankaŭ indas atenton. I.L.E.I. povus kontribui bone al pedagogia scio per ĉi tiu esplorado, kvankam limigita.

Se vi volas helpi, bonvolu respondi tre mallonge, aldonante la tipon de la lernejo, kie vi deoras, kaj dum kiom da jaroj vi instruas.

Findato por A. kaj B. : la 25-a de

NEKROLOGO

En Budapest mortis la 2-an de januaro en sia 76-a aĝo pedagogia seminaria direktoro, prof. Jozefo Mihalik.

Li fariĝis esperantisto en la milit-kaptiteco en Siberio jam tie kune agante kun s-anoj Julio Baghy, M. Sárossi, I. Balla. Pri tiu vivo ni povas legi en la novelo "Verda Koro" de Baghy. Hejmenveninte li gvidis kursojn en instruistina lernejo, ĉe la urba Popolkleriga Komitato kaj en Libera Universitato. Du foje li estis redaktoro de *Hungara Heroldo*, verkis lernolibrojn kaj eldonis, parte verkis ilustritajn popolklerigajn kajerojn en Esperanto por konigi eksterlande historion, kulturon, arton de la popolo.

Li estis prezidanto unue de la Hungarlanda Esperanto-Societo, poste de la Esperanto-Pedagogia Societo, kiun li fondis, kaj de 1935 ĝis la fino de la dua mondmilito de la Hungara Esperanto Federacio, kiu celis kunigi la diversajn societojn kaj eĉ donis eblecon al la laborista esperantistaro — kies societon la tiama registaro ĉesigis — en aparta sekcio plu agadi.

Li prezidis la UK en 1929 en Budapeŝt kaj oficiale reprezentis Hungarlandon (la ministron de instruado) en la UK en Oxford kaj Krakov.

Ce lia enterigo ĉeestis aro da esperantistoj kaj iamaj kunlaborintoj, en kies nomo Julio Baghy diris kortuŝan adiaŭan paroladon.

majo, 1959.

Adreso : Centra Oficejo de I.L.E.I. 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo.

"Geonkloj Esperantistaj".

La skemo nun funkcias kaj kreskas. Je la dato 14-2-59 estis 72 geonkloj kaj 75 genevoj el 20 landoj. 37 onkloj kaj 21 onkloj jam parenčiĝis kun 36 nevoj kaj 38 nevinoj. La restanta nevino postulas onkl(in)on en la urbo Madrid.

14 geonkloj atendas. Pluraj estas pretaj akcepti pli ol unu ! Britujo kaj Ĉeĥoslovakujo proponis la plej grandan nombron da genevoj. En aliaj landoj ili estas treege malmultaj.

Kiel jam anoncote, la skemo celas helpi la junajn komencantojn progresi en la lingvo kaj en la movado.

La Administranto estas : S-ro J. H. Sullivan, 3 Warwick Ave. Urmston, Manchester, Anglujo, kiu bonvenigos pli da geonkloj kaj multe pli da genevoj. (Ne forgesu helpi per respondokuponj).

Tra la Mondo

● **Anglujo.** En la universitato de Kembrigo parolis d-ro Ivo Lapenna al la Societo Esperantista substrekaante la gravecon de studentaj Esperanto kluboj.

● **Aŭstrujo.** De s-ro Gottfried Hofstätter ni ricevis longan artikolon, kiu temas pri propono, ke en ĉiuj lokoj — stacidomoj kaj aliaj trafikcentroj — kie oni trovas multajn homojn, estu montra surmura kesteto. La kestetoj havu en ĉiuj lokoj la samajn mezurojn kaj parte la montrata materialo estu eble samspeca, redaktata de unu centro (kaj s-ro Hofstätter proponas: CED), kaj renovigata sufiĉe ofte. La propono estas interesa, sed ĉu momente realigebla?

● **Belgujo.** En Verviers okazis la 13-an kaj 14-an de decembro 1958 la 50-jara jubileo de la loka grupo, trilandan renkontiĝo, ekspozicio en grand-magazeno, Zamenhof-festo kaj solenaĵo okaze de la 10-a reveno de la Tago de la Homaj Rajtoj.

● **Brazilo.** Esperanto en lernejojn por rememorigi la Unuan Centjaron post la naskiĝo de dr. Zamenhof. Espereble en diversaj brazilaj urboj oni dekretos la enkondukon de la instruado de Esperanto en lernejojn en 1959. En la grava industria urbo Juiz de Fora, Minas Gerais, laŭ la ĵus eldonita Leĝo n-ro 1.194 estas "kreita la instruado de Esperanto en la urbaj lernejoj". En la Federacia Distrikto (Rio de Janeiro) jam estas publikigita leĝprojekto diskutenda kaj espereble aprobita en 1959.

La leĝo 1.194 validas ekde la 24-a de decembro 1958 por la preparado de la necesaj instruistoj kaj nur post 12 monatoj komenciĝos la instruado al la geknaboj dufoje ĉiusemajne.

● **Ĉeĥoslovakujo.** En Ustí nad Labem (Nordbohemujo) oni solene festis la 99-an datrevenon de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof la 17-an de decembro 1958.

● **Hispanujo.** Zamenhof-strato estos inaŭgurata venontsomere en Tarrasa (Barcelona).

● **Hispanujo.** La Ĵurnalo Diario de Barcelona (17.12.58) enhavas tute pagan artikolon pri d-ro Zamenhof kaj la Internacia Lingvo — de s-ro Jaime Aragay.

● **Hungarujo.** Statpremiita skulptisto Tamás Gyenes okaze de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof transdonis al la hungara Esperanto-movado statuon: la kapon de Zamenhof. La prezidanto de la Budapesta fakrondo, d-ro Kalocsay ĝin transprenis. Festparolado de Baghy, voĉlegado de Kalocsay, muziko kaj kantado, finaj vortoj de Balkanyi estis punktoj de la festo.

Alia arango en Budapeŝto estis dediĉita al la Esperanto-tradukanto Ladislao Somlai, kiu ĉeestis kaj rakontis pri siaj spertoj rilate al tradukado.

● **Italujo.** ILEI sendis observanton al la delegita kongreso de Mondfederacio de Organizaĵoj de la Instruista Profesio (W.C.O.T.P.) okazinta en Romo en julio-aŭgusto 1958.

● **Italujo.** La 12-a Internacia Filozofia Kongreso okazinta en Venecio kaj Padua en septembro 1958 spertis la malfacilaĵojn de plurlingveco. Pri siaj spertoj tiurilate skribis nederlanda d-ro Delfgaauw, tamen supozeble ne pripensante la racian solvon, la Internacian Lingvon. (Sendis raporton pri tio s-ro Groendijk el Arnhem, Nederlando).

● **Nederlando.** Refondiĝis nederlanda sekcio de TEJO laboranta precipe en mezlernejaj medioj.

● **Internacia Grafika Esperanto-Ligo** de nun kunigas la laboristojn de la grafikaj metioj (presistoj, tipografoj, k.t.p.). IGEEL publikigas regule informilon. Sekretario: S-ro F. B. E. ten Hagen, Neppeustraat 33, Amsterdam, Nederlando.

● **Pollando.** La gazeto "Kurier Polski" publikigis artikolon pri la agado en Bjalystok. Detale priskribas la starigon de Zamenhof-monumento ĉe la angulo de la stratoj Zamenhof kaj Malmeda, aperon de gvidlibro tra Bjalystok en pola kaj Esperanto kaj urbajn preparaĵojn por akcepto de multaj gastoj, ĉio okaze de la 44-a UK.

● **Sovetunio.** Esperanto-sekcio ĉe Odesa Domo de Scienculoj vikle laboras. Funkcias 9 studrondetoj, oni eldonas murgazeton kaj planas eldonon de diversaj libretoj. Kunvenas lunde kaj vendrede inter la horoj 19-a kaj 22-a en strato Mendelejeva 4 (proksime de ŝpistacidomo).

ESPERANTISTA KULTURA FESTIVALO EN LJUBLJANA, JUGOSLAVIO

Slovenia Esperanto-Ligo inaŭguris la Zamenhof-Jaron per arango de la Dua Esperanta Kultura Festivalo en Ljubljana, la 15-an de februaro. En ĝi kunlaboris 147 gejunuloj el 7 sloveniaj urboj.

En la konkurso "Montru vian Kapablon" debutis tre sukcese tri junaj talentaj poetoj. La unuan premion gajnis 11-jara lernanto Janez Golob. En oratora konkurso okupis la unuan lokon Svobodan Zlatnar.

Krom la konkursoj okazis kultura programo prezentita de gejunuloj, kiuj lernis Esperanton en la lernejo. Alternis recitoj, kolektivaj deklamadoj, kantoj, dancoj, baletoj, pup-teatro kaj jazo. La plej elstaraj programeroj estos prezentitaj dum la tutlanda kultura Esperanto-festivalo en Opatia en Majo. Gazetoj kaj radio dediĉis merititan atenton al festivalo.

ESPERANTO-KURSOJ EN MADAGASKARO

La antaŭa ĉefdelegito de U.E.A. en Maroko, S-ro Henri Rousseau, kiu antaŭ nelonge ekloĝis en Madagaskaro, tuj komencis tie efikan agadon por Esperanto. En tiu lando, kie apenaŭ ekzistas movado, post lia propagando pli ol 150 personoj, grandparte indiĝenoj, venis al unua informa kunveno fine de januaro. Nun, en du paralelaj klasoj partoprenas ĉ. 120 lernantoj. Kursgvidantoj estas S-ro Rousseau kaj S-ro Rasoanaivo, malnova fidela membro de U.E.A.

Rimarkinda kaj tre favora por niaj agantoj estas la fakto, ke la madagaskara Ministro de Produktado estas esperantisto.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de marto 1959

N-ro 314

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro kaj ankaŭ por komparo je la fino de februaro 1958:

	1958	1959
Asociaj membroj	5273	4320
Individuaj membroj		
MJ	484	564
MA	3428	3671
MS	431	405
Pat.	5	7
DM	296	334
HM	46	46
JMJ	9	13
JMA	59	104
	4758	5144
	10031	9464

NOVA ĈEFDELEGITO

Aŭstrujo
Sinner, Maj. Oskar, Schönbrunner-
Allee 53, Wien XII. Pĉk. 38751.

DELEGITOJ

Belgujo

Charleroi (Hainaut) VD : S-ro Marcel
Devillez, komerca agenteo, 17, rue
Delimborg, Marcinelle.
FD (tekniko de vendado) : la VD.

Brazilo

Campinas (São Paulo) D : S-ro Antônio
Joaquim Pereira, elektroteknikisto,
Rua Francisco Assis Pupo 591.
FD (fervoja signalado) : la D.

Britujo

Alfreton (Derbyshire) D : S-ro Charles
Tingle, sanitara inspektoro (eks.),
"Shiregreen", Derby Road, Swan-
wick.

Ĉeĥoslovakujo

Obořiště (Ĉeĥy) D : vakas.
Razová (Morava-Slezsko) D : vakas.

Danlando

Lyngby (Sjælland) FD (filatelo) :
vakas.

Vejle (Jylland) FD (instruado de ne-
inteligentaj infanoj) : vakas.

Finnlando

Muurla (Turun ja Porin lääni) D :
vakas.

Francujo

Villeurbanne (Rhône) D : S-ro Raymond
Gonin, blindul-instruisto, 20 avenue
de Saint-Exupéry.
FD (blindul-aferoj) : la D.

Germanujo

Heide (Dithmarschen) JD : vakas.

Horrem (Nordrhein-Westfalen)
D : vakas.

Montabaur (Rheinland-Pfalz) D : vakas.

München (Bayern) FD (tekniko) :
vakas.

Hindujo

Hoshiarpur (Okcident-Punjab) D : S-ro
Bhiksu Anuruddha, budhana monaĥo,
Vedic Research Institute, P.O. Sadhu
Ashram.
FD (budhismo-hinduismo) : la D.

Izraelo

Herzlia FD (vivreformo) : vakas.

Jugoslavio

Split (Dalmacija) FD (biologio) : vakas.

Nederlando

Goes (Zelando) D : vakas.

Norvegujo

Oslo FD (filatelo) : S-ro Thor Magnus
Carlsen, komerckorespondisto,
Sinsenveien 83b, Refstad.

Pollando

Katowice FD (turismo) : S-ro Tadeusz
Szczepanek, teknikisto-mekanikisto,
ul. Sienkiwicza 27m3.

Kostrzyn n/O (voj. Zielona Góra) D :
S-ro Zdzislaw Kurzwa, oficisto,
Sanatorium.

Portugalujo

Almada (Estremadura) D : vakas.

Sudafriko

Vryheid (Natal) D : vakas.
FD (adventismo) : vakas.

Svedujo

Göteborg (Västergötland) FD (instru-
isto) : S-ro Oskar Svantesson, in-
struisto de elementa lernejo,
Skonertgatan 1.

Hälsingborg (Skåne) VD : vakas.

Kumla (Närke) FD (konfekcio) : vakas.

Malmö (Skåne) JD : vakas.

Trelleborg (Skåne) VD : S-ino Elly
Persson, Söderslättskatan 71.

Trollhättan (Västergötland) D : vakas.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1959

259 Micoud, S-ro F., Nemours, Algerio.

260 Collier, S-ro John, Newdegate,
Aŭstralio.

261 Winchcomb, S-ro C., Welland,
Aŭstralio.

262 Pich, S-ro Jozef, Kaltenleutgeben,
Aŭstralio.

263 Meister, D-ro Oscar, Graz,
Aŭstrujo.

264 Boffejon, S-ro Hector, Brasschaet,
Belgujo.

265 De Mot, S-ro René, Bruxelles,
Belgujo.

266 Staes, S-ino E., Bruxelles, Belgujo.

267 Amorim, D-ro Nid Dutra d',
Salvador, Brazilo.

268 Araujo, F-ino I. Baggi de, Rio de
Janeiro, Brazilo.

269 Araujo, S-ro Get. Soares de, Rio
de Janeiro, Brazilo.

270 Abril, S-ino Irene de Araujo M.,
Copacabana, Brazilo.

271 Augusto, S-ro O., Barra Mansa,
Brazilo.

272 Bondarovsky, S-ro E., Barra
Mansa, Brazilo.

273 Bondarovsky, S-ro Samuel, Barra
Mansa, Brazilo.

274 Braga, S-ro I. Gomes, Rio de
Janeiro, Brazilo.

275 Caymmi, F-ino Viv. de M.,
Salvador, Brazilo.

276 Cosenza, S-ro Braz, Rio de
Janeiro, Brazilo.

277 Costa, S-ro Francisco F. da, Rio de
Janeiro, Brazilo.

278 Costa, F-ino Yolanda de Araujo,
Rio de Janeiro, Brazilo.

279 Coutinho, S-ro A. Caetano, Rio de
Janeiro, Brazilo.

280 Dionísio, S-ro Carlos H.,
São Leopoldo, Brazilo.

281 Freitas, S-ro Odegar Dy Araujo,
Alagoinhas, Brazilo.

282 Gama, S-ro Joao de Oliveira,
Juiz de Fora, Brazilo.

283 Goes, S-ro Godofredo de Araujo,
Salvador, Brazilo.

284 Knoedt, S-ro Leopoldo Henr.,
Salvador, Brazilo.

285 Nogueira, S-ro Walter José, Rio de
Janeiro, Brazilo.

286 Nunes, S-ro E. Pereira, São Paulo,
Brazilo.

287 Padua, Kolonelo Geraldo, Belo
Horizonte, Brazilo.

288 Peccioli, S-ro Italo, Jaú, Brazilo.

289 Pinto, S-ro José Dias, Santo
André, Brazilo.

290 Santiago, S-ro Paulino, Meceió,
Brazilo.

291 Santos, S-ino Zenite de Castro,
Teófilo Otoni, Brazilo.

292 Teixeira, S-ino Lila, Rio de
Janeiro, Brazilo.

293 Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro,
Brazilo.

294 Verde, D-ro Edmundo Vila,
Araruama, Brazilo.

295 Villa Nova, S-ro Thomas T.,
Recife, Brazilo.

296 Bachman, S-ro S. P., Hove,
Britujo.

297 Bailey, S-ro Eric, Ashford,
Britujo.

298 Francis, S-ro R., Gravesend,
Britujo.

299 Fraser, F-ino R. G. M., Ilford,
Britujo.

300 Garraway, F-ino E., Sheffield,
Britujo.

301 Laurie, S-ro E. J., Bournemouth,
Britujo.

302 Laurie, S-ino W., Bournemouth,
Britujo.

303 Millidge, Pastro R. G., Sutton,
Britujo.

304 Relf, S-ro E. F., Addlestone,
Britujo.

305 Seddon, S-ino R., Southport,
Britujo.

306 Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven,
Britujo.

307 Toms, S-ro C. H., Freshwater,
Britujo.

308 Kuusio, S-ro Topi, Helsinki,
Finnlando.

309 Lange, S-ro O. C., Hvidovre,
Danlando.

310 Lassen, S-ro Aug., København,
Danlando.

311 Romano-Joly, S-ro M., Moyen
Congo, France Ekv. Afriko.

312 Bellard, S-ro Luc, Nantes,
Francujo.

313 Bideau, S-ro A., Dyon, Francujo.

314 Beaucaire, S-ro Louis, Berlin,
Germanujo.

315 Bepperling-Wolff, S-ino A.,
Wetzlar, Germanujo.

316 Dücker, S-ro Alfred, Bad Hersfeld,
Germanujo.

317 Schmidt, S-ro Alfred, Rüsselsheim,
Germanujo.

318 Treude, D-ro Wilhelm, München,
Germanujo.

319 Wingen, S-ro Wilhelm, Köln-Sülz,
Germanujo.

320 Alavedra, S-ro V., Tarrasa,
Hispanujo.

321 Alberich-Jofre, S-ro S., Barcelona,
Hispanujo.

322 Kenn, D-ro Wong, Macao,
Hong Kong.

323 Blöndal, S-ro Björn P.,
Hvammstanga, Islando.

324 Giunio, S-ro Petro, Zagreb,
Jugoslavio.

325 Kovačević, S-ro Miodrag, Šabac,
Jugoslavio.

326 Šaponjić, S-ro Inđ. M., Beograd,
Jugoslavio.

327 Forgeau, S-ro Jean, Montreal,
Kanado.

328 Symoens, S-ro Edward, Leopold-
stad, Kongo Belga.

MEMBRO-SUBTENANTO 1958

535 Enstrom, F-ino M. L., Johanneshov, Svedujo.

PATRONOJ 1959

6 Beck, D-ro A. K., Sevenoaks, Britujo.

7 Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Jelec, S-ro F., Maison, Algerio.

Simpkins, S-ro W. L., Bracknell, Britujo.

FONDAĴO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 10.343,75 gld.

Ernesto Sonnenfeld 25.42 gld., Argentino; I. Krewnivch 7.- gld., J. N. Prewett 7.- gld., Aŭstralio; G. De Brouwere 14.70 gld., P. Samijn 2.20 gld., F-ino M. J. Top 1.84 gld., J. De Maeyer 15.20 gld., H. van Roije 9.50 gld., G. Maertens 3.80 gld., G. v. d. Wiele 7.60 gld., L. Spruyt 1.90 gld., V. Cornelis 1.90 gld., A. De Fauw 1.90 gld., R. Schoetens 1.90 gld., G. Goossens 2.28 gld., Belgujo; Getulio de Araujo 2.55 gld., D-ro Modesto Belmonte de Abreu 15.28 gld., Brazilo; D-ro A. K. Beck 42.50 gld., Londona Klubo 86.54 gld., S-ino J. H. Niven 5.33 gld., Britujo; Mogens Rude Andersen 2.70 gld., O. Christensen 8.20 gld., R. kaj V. Kvist 5.45 gld., E. S. 13.65 gld., H. Tobiesen 10.90 gld., Danlando; Klubo Mikkeli 17.25 gld., F-ino Impi Salo 6.- gld., A. A. Jurva 7.45 gld., T. Pöyry 2.30 gld., F-inoj Irja kaj Sylvia Miettinen 6.90 gld., Usko Salin 5.75 gld., Finnlando; S-ino Guibert 7.70 gld., M. Moindrot 1.54 gld., F-ino M. Fercoq 7.70 gld., Francujo; Wilhelm Knauss 3.90 gld., H. Daum 18.06 gld., F-ino E. Heuzeroth 4.51 gld., J. Nissen 9.02 gld., D-ro Ing. F. Seidel 4.51 gld., D-ro W. Treude 6.77 gld., F-ino Elise Meyerhuber 22.56 gld., F. Hartjen 4.51 gld., W. Heimlich 4.51 gld., H. Lachmund 4.51 gld., F-ino A. M. Orterer 15.79 gld., S-ro G. Podlinski 6.32 gld., Esp. Grupo München 27.07 gld., A. Warner 9.93 gld., J. Wittman 2.71 gld., H. Daum 9.05 gld., E. Desch 1.81 gld., R. Klisch 13.57 gld., S-ino E. Meyerhuber 9.05 gld., S-ino F. Michalik 13.57 gld., R. Schinkel 4.52 gld., J. Bettges 6.79 gld., S-ino M. Beutke 9.05 gld., G. Johannes 4.52 gld., T. Kraft 9.05 gld., F. Lowitzer 0.90 gld., Max Mollenhauer 2.71 gld., E. Richter 2.26 gld., D-ro L. Röhl 13.57 gld., W. Scheer 4.52 gld., K. Vosteen 4.52 gld., Germanujo; José Ticó 2.88 gld., Angel Diez 1.44 gld., Florencio Enfedaque 2.16 gld., M. Fernandez M. 3.60 gld., Jaime Herp 3.60 gld., José Olive 1.44 gld., Luis Armadans 1.44 gld., Alfonso Escamilla 1.44 gld., C. Martinez 0.72 gld., Julián Martinez 5.76 gld., Alfredo Villa 7.20 gld., Alberto Menedez 1.62 gld., Pedro Naranjo 1.44 gld., Vicente Marin 5.04 gld., Juan Figueras 3.24 gld., Antonio Llinas 2.16 gld., Esperanto-Rondeto 3.60 gld., "Maro estas gutaro" 7.20 gld., Venancio Monsalve 8.64 gld., C. Fernández 1.44 gld., Esteban Travé 1.80

gld., Pedro Nuez 3.24 gld., E. Moreno 2.52 gld., Tomás Apraiz 1.44 gld., E. Larrouy 1.44 gld., R. Palacios 1.44 gld., M. Martín G. 1.44 gld., Josep Carulla 3.60 gld., F. García H. 1.44 gld., M. Cantalapedra 0.72 gld., Esperanto-Grupo Moyá 7.20 gld., Hispanujo; Adv. G. Boscarino 30.- gld., D-ro Campetti Gaetano kaj edzino, S-ino Felicia Baumgarten-Campetti 30.- gld., Giuseppe Cettini 4.50 gld., "je memoro de mia filo Silvio". Giuseppe Quarone 6.- gld., Augusto Zorzi 1.20 gld., Giovanni Bissaldi 3.- gld., Giuseppe Carassa 6.- gld., Torino-Grupo 174 gld., Prof. Salvatore Panvini 6.- gld., Italujo; Z. Jovanović 3.- gld., Milan Milijić 3.- gld., Dušanka Kačarević 6.- gld., D-ro Janjić 3.- gld., Milan Lončarić 1.80 gld., Jugoslavio; V. P. Ronald 16.36 gld., Kanado; "Busumano" 2.50 gld., H. J. Maagd 1.- gld., S-ino v. d. Lekmuns 2.50 gld., N.N. en V. 50.- gld., F-ino S. van Wijngaarden 5.- gld., "Busumano" 3.- gld., S-ro Kamman 10.- gld., B. M. Slösser-Bresler 10.- gld., W. M. Smit 2.50 gld., G. F. Maris 5.- gld., Busumanino 2.50 gld., F-ino L. Th. Hovenkamp 1.- gld., S-ro van Huizum 1.50 gld., Nederlando; H. A. Rosbach 11.10 gld., J. A. Kleven 11.90 gld., S-ino Liv. Beckström 5.29 gld., Norvegujo; José Antunes 6.61 gld., Raul Picado Jor. 2.64 gld., D-ro Cesar Anjo 6.61 gld., Manuel de Freitas 10.- gld., Raul Picado Junior 2.64 gld., D-ro A. César Anjo 6.61 gld., A. Rodrigues Correia 2.64 gld., Portugalujo; J. Abele 6.- gld., Sovet Unio; J. Summelink 10.65 gld., Sud-Afriko; Lars Andersson 7.29 gld., M. S. Syrjämäki 9.47 gld., Edvin Porsbring 8.74 gld., Vald. Henriksson 1.46 gld., S. Runfeldt 7.29 gld., A. L. Hallgren 18.21 gld., Karl Härnqvist 5.10 gld., Erik Brenander 8.74 gld., Albert Björnemo 18.22 gld., Svedujo; S-ino Blanche Parker 3.77 gld., Benjamin Reich 18.85 gld., S-ino Martha Walker 7.54 gld., Usono.

Entute 11.637,78 gld. je 1.3.1959.

Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

OFICEJA ILARO

S-ro Ernesto Sonnenfeld, Argentino 20.- gld.; N.N. en V., Nederlando 10.- gld.

DONACO AL A.P.O.

S-ro J. Derieuw, Belgujo 38.- gld.; "E.S.", Danlando 13.65 gld.; S-ino E. Meyerhuber, Germanujo 4.52 gld.; N.N. en V., Nederlando 10.- gld.

DONACIOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro H. Davies, Britujo 21.30 gld.; S-ro H. Dresselhaus, Germanujo 0.90 gld.; N.N. en V., Nederlando 10.- gld.; Karl Bengtsson, Svedujo 1.46 gld.; S-ino Louise Berthold-Schmidt, Usono 188.- gld.; S-ro B. Reich, Usono 23.56 gld.; F-ino B. van Hill, Usono 3.77 gld.; S-ro Tony Nabby, Usono 13.53 gld.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon!
M. H. VERMAAS, Direktorino C.O.

ANONCETOJ

La Navigantoj. Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon - se havebla - vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono Cunningham 4487.

Katolika Esperantisto! Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jarkotizo ned. gul. 6.- = 24 steloj aŭ egalvaloro. Membroj ricevas la monate 20-paĝan Esperanto-revuon ESPERO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Pola Geedziga Officejo havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Skribu al: "Swatka", Lodź, Piotrkowska 133, Polujo. Aldonu respondkuponon.

Ibra Radio, la libera kristana radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20-a horo MET. Ondlongoj 32.3 m., 26.1 m. kaj 20.2 m. Ibra sendas ankaŭ en multaj lingvoj. Aŭskultu ĝiajn programojn kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

Esperanto-Civito, Dover. Fondajo staras je 7 anglaj pundoj. Donacoj afable al konto de S-ro N. H. Smith ĉe U.E.A.

Esperantistojn Kolektanta Internacia Klubo (E.K.I.K.) havas membrojn en 24 landoj. Turnu vin al: Louis Obreczian, P.O. Box 51, Waterman Pa., Usono.

Por ricevi materialon por nia ekspozicio en magazena fenestro ni petas pri alsendo de belaj il.p.k. el la tuta mondo. Ĉiu sendinto partoprenos lotumadon, kiu donos al du sendintoj po unu senpaĝan jarabonon je la bela revuo Norda Prismo. Adreso: Klubo Esperantista de Falun, Box 1107, Falun, Svedujo.

Gravaj libroj aĉetebblaj. Ginz kaj Kamaryt; Ĉeĥoslovaka antologio, 15.- gld. Hekler; Arthistorio 3.- gld. Herzl; La juda stato, 2.25 gld. Baghy-Kalocsay, Arĝenta Duopo, dua volumo, 2.50 gld. Szilagy, Trans la fabeloceano, 3.25 gld. F. Zamenhof, Verkoj de Fez, 4.00 gld. Narasu; Budao, 0.50 gld. Davidov Saratov; Bibliografia katalogo de la biblioteko 1888-1911a, 275.- gld. Indra; Norda literaturo 1 kaj 2 kune, 1.- gld. Boudier Bakker; Surprizoj, 4.50 gld. Mendu ĉe H. Veenstra, J. M. Kemperstraat 28, Amsterdam W., Nederlando. Petu mian libroliston. Ni okazigos **letervesperon** je la komenco de majo. 35 gejunuloj atendas viajn pktojn. Esperanto-Grupo Moyá,

Str. Forn 21, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Penka Popova, Dobruĝa 11, Tirnovo, Bulgario, 54 jara instruistino deziras tutmondan amikan korespondadon.

60 gekursanoj-komencantoj deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn, fotografaĵojn k.a. kun ĉiuj landoj. Adreso: Esperantista Societo "Balkana Stelo" Trojan, Bulgario.

14 plenkreskuloj, estontaj elementaj instruistoj, lernas Esperanton, deziros korespondantojn kiel ĉisube. Skribu al S-ro D. Landsman, Teachers' Training College, Kowhai Rd., Wellington W.1, Nov-Zelando. Ĉi tiu anonco validas nur du monatojn. Korespondos kun Izraelo, Nederlando, Germanujo, Hispanujo, Francujo, Svedujo, Italujo, Ĉinujo, Argentino, Svedujo, Malajo, Japanujo, Indonezio, Meksikio, Grekujo, pri elementa instruado, muziko, arto, filozofio, literaturo, sporto inkluzive piedvagado kaj ŝkiado kaj ĝeneralaj temoj. Ankaŭ pri Svisa konstitucio, Brazilia ekonomio (Amazonas), Rusa pacmovado, Hinda komerco, Kuba reformado.

Italo kaj nederlandanoj deziras kontakti Esperantiston kiu iros Varsovian Kongreson aŭtomobile. Celo: Pagante kunvojaĝi, ekde Nederlando. Skribu al: F-ino S. v. Wijngaarden, Bloklandstraat 34-D, Rotterdam.

C. L. Unchitti, P.O. Box 1231, Bangkok, Thailand. Bonvolu ne sendi al mi ian presajon aŭ skribaĵon el komunist-

landoj, aŭ el alilandoj tiujn, kiuj rilate al la politiko. Dankema.

Dez. labori jul.-aŭg. en Francujo 16 j. knabo, par. Esp., france, angle kaj germ. Eric Weijer, Ommerenweg 12, Ede, Holland.

Studentaj flegistinoj, dekokjaraj aŭ pliagaj, bezonataj ĉe Bolingbroke kaj Battersea General Hospital (antaŭe eduklernejo). Skribu al: Matron, Bolingbroke Hospital, Wandsworth Common, London S.W. 11, Anglujo.

20 junaj gelernantoj, 16-17 jaraj, de supera lernejo deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Gejunuloj ĉiulandaj skribu amase al: S-ro Detlev Blanke, I.F.L., Baŭ C, Neukloster, Kr. Wismar, Germanuj-DDR.

Studento, Sung Jae, Seo, c/o Zin Woo, Seo, 608 Nam San dong, Taegu, Koreo, deziras korespondi kun eŭropanoj.

Juna studento deziras korespondi kun samidea(in)oj el tuta mondo pri diversaj aferoj; ankaŭ kolektas bildkartojn. Wilson G. Silva Caixa Postal 152, Votuporanga, EFA Sp. Brazilo.

S-ino Halina Denenfeld, Klodzko, str. Holdu, Pruskiego 11, Pollando kaj S-ino Danuta Zajec, Bystrzyca Klodzka, str. Bystrzycka 3/5 deziras korespondi kun eksterlandaj esperantistoj, precipe ekster-eŭropaj, kiuj partoprenos en la Universala Esperanto Kongreso en Varsovio.

15 gekursanoj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Ni povos interŝanĝi bildkartojn, librojn k.a.

Respondo garantiita. Alskribu per instruistino: S-ino Rajna Kasabova, str. Kiril k. Metodi 70, Kolarovgrad, Bulgarujo.

Sveda familio deziras malmultekostan loĝejon kun mem-mastrumeblocoj dum 2 semajnoj somere en bela alpa regiono. S-ino Linnea Edsenius, Vilhelmsgatan 2 Nybro, Svedujo.

Mi serĉas korespondantojn pri UFO-literaturo kaj interŝanĝon de tiuspeca literaturo en lingvoj: germana, franca, angla, itala event. ankaŭ hispana kaj portugala (se ne konas Esperanton) — kontraŭ pollandaj esperantistoj aŭ artistaj polaj eldonadoj aŭ muziknotoj (majstroverkoj de pentrarto, albumoj kun popolokostumoj ktp). Specimenoj de UFO-gazetoj ege petataj! Johano Zawada, sekretario de L.K.K. ul. Pruskowska 6. m. 286 Warszawa 21, Pollando.

12 mezlernejaj knabinoj 15-18-jaraj serioze deziras korespondi kun la tuta mondo. Máv Nevelóintézet. Békéscsaba VI, Árpádsor, 22, Hungarujo.

Nova Esperanto-grupo petas sendi ĉian esperantaĵon por ekspozicio por disvastigi Esperanton en nia urbo, kaj ankaŭ salutbildkartojn el ĉiuj landoj. Ankaŭ ni volas korespondi kun ĉiuj landoj. Bonvolu helpi nin kaj korespondi kun ni pri diversaj temoj. Adreso: Esperanto-Grupo, Meggyes u. 5. Pápa Hungarujo, ĉiam validas.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo. Administracio:

ARTA JUBILEA GLUMARKO

Komune uzata de ĉiuj Esperanto-
organizaĵoj en la mondo. Vendata je
kostprezo: 4.- gld. (16 steloj) por 1000
ekz. plus sendkostoj.

Aperinta! Vidu banderolon de tiu ĉi numero!
Mendu ĉe U.E.A.

PROVIZORA EKSPORT - IMPORTO

UA, LB 6A SSS VAXJÖ SVEDIO
MANUFAKTUR- KAJ SLOJD-PRODUKTAĴOJ
PENTRILOJ TURISTAJ AFEROJ
Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Helsingör

Danlando

La internaciaj feriaj Esp-kursoj okazos 25/7 - 1/8 59
en La Internacia Alternejo de Helsingör. Kursoj:
Prepara por Cseh-metodaj ĝeinstruistoj, Konver-
sacia, kaj Daŭriga.

Venu por lerni kaj ĝui belegan semajnon kun
gesamideanoj el 10-12 diversaj landoj. Prospekto
senpage havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

VOĈO DE ISLANDO

aperas denove, nun dufoje en jaro. - Se vi interesiĝas
pri Islando, ĝia literaturo ktp., abonu ĝin. Ĝi kostas
4 int. respondkuponojn jare (islandanoj devas pagi
multe pli por ebligi la eldonon). Tiuj, kiuj abonas
por 1959, povas ricevi la du numerojn de 1958 kontraŭ
2 int. respondkuponoj; do, 6 rpk. por tiuj du jaroj.
Pro limigita kvanto ni ne povos liveri provnumerojn.

VOĈO DE ISLANDO,

poŝtkesto 1081, Reykjavík, Islando

STAFETO

inaŭguras la Zamenhofan Jaron per

1 JULIO BAGHY SONĜE SUB POMARBO

triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj
232-paĝa

"Ĝi enhavas la plej belan, plej fluan, plej originan poezion, kiu ĝis nun aperis en Esperanto. Kaj la poezio estas viva en tute nova maniero."

Stellan Engholm

2 ESPERANTA ANTOLOGIO POEMOJ 1887-1957

648 paĝoj kun pli ol 350 poemoj de 90 poetoj
el 35 landoj de ĉiuj kontinentoj en redakto de

William Auld

prezentas la plej kompletan kolekton de poeziaj ĉefverkoj de Zamenhof kaj de liaj sekvintoj

"La antologio estas pli riĉa kaj altnivela, ol atendoj promesis. Ĝi estas ripozo, ĝuo, instigo kaj klerigo por ĉiuj, kiuj povas legi poezion, ĝi estas lernejo por novaj poetoj."

Stellan Engholm

3 GASTON WARINGHIEN LINGVO KAJ VIVO

Esperantologiaj eseoj

Elĉerpa analizo de lingvo de Zamenhof
ĉ. 460-paĝa

4 MARJORIE BOULTON EROJ

(Originala Poemaro)

ĉ. 350-paĝa

La du lastaj sub preso sed baldaŭ aperontaj
4 antaŭaj titoloj de STAFETO jam elĉerpiĝis!
Mendu nun vian ekzempleron!

La librojn liveras la Eldonisto J. Régulo,
UEA kaj ĉiuj libroservoj de la Movado

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON!

Rondvojaĝoj por geesperantistoj:

Kiel en la lasta jaro tiel ankaŭ en la nuna jaro aranĝos la sekretariato por internac. porinstruistaj kaj porjunulaj vojaĝoj "SEST" rondvojaĝon tra Aŭstrujo kaj — se aliĝus sufiĉe da geesperantistoj — Kvinlandan-rondvojaĝon.

I. Rondvojaĝo tra Aŭstrujo:

Ankaŭ en la nuna jaro gvidos vin la faksperta s-no dir. Fr. Föttinger, prez. de la salzb. Esperanto-Asocio. Li montros vin la vidindaĵojn de la lando. En Vieno, Knittelfeld kaj Salzburgo atentis vin aŭstriaĵ gesamideanoj. Tutkosto: 3000 aŭstr. ŝ., ampleksante veturadon ekde Vieno ĝis Salzburgo, tranoktadon en hoteloj aŭ gastejoj kun plena pensio, ĉiujn ekskursojn kaj enirkostojn, sed ne biletojn por teatro k.t.p. Komenco de la rondvojaĝo je la 9a de aŭgusto en Vieno, fino je la 21a de aŭg. en Salzburgo.

II. Kvinlanda-rondvojaĝo:

Vojaĝoj instruas, vojaĝoj interligas, vojaĝoj propagandas nian lingvon; jen la celoj de tiu-ĉi rondvojaĝo, kiun gvidos faksperta salzburga profesoro. La studvojaĝo donos vin okazon rigardi la alpojn laŭ la Großglocknerstrato, la Karavankojn dum la vojaĝo al Ljubljana. Ni vizitos Postojna, Trieste, Venecio, Padua, Ravenna, Chioggia, Rimini, San Marino, Firenze, Pisa, Genova, Milano, Como, Moritz, Merano, Innsbruck, Garmisch-Partenkirchen, Munkeno. Prezo: 2400 aŭstr. ŝil. por la aŭtobuso Salzburgo - Munkeno, tranoktado en hoteloj kaj gastejoj, vesper- kaj matenmanĝo, gvidado kaj ĉiuj enirkostoj, daŭro ekde la 9a ĝis 22a de aŭgusto 1959. Fino de la aliĝo: por la rondvojaĝo tra Aŭstrujo: 30a de aprilo 59; por la Kvinlanda rondvojaĝo: 15a de aprilo 1959. Aliĝojn kaj detalan informon ĉe:

Josef Steppan, ĉefinstruisto en Hüttlingen/Württ. Germanujo.

Kun la aliĝo bv. pagi 1/3 de la vojaĝkostoj al "SEST"-sekretariato por porinstruistaj kaj porjunulaj vojaĝoj en Salzburgo, Mozartplatz 8-10, Aŭstrujo, konto n-ro 1925 ĉe Sparkasse Salzburg/Aŭstrujo. Bv. aldoni al via informpeto intern. respondkuponon!

Por via Komercio

kun Italio kaj aliaj landoj uzu la servojn de la

Euroamerican Agency

(eŭrop-amerika agentejo, l.r.k.)

sidejo en Viale Don Minzoni 24-D

MONTECATINI TERME, Pistoia, Italio

"VAL DI NIEVOLE"-n

Abonu

arta, literatura kaj turisma gazeto por la Nievai-valanoj loĝantaj eksterlande.

Piazza Mazzini, 89, PESCIA, Pistoia, Italio

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam